

Bulgara Esperantisto

Decembro 1991

ELINO TARNOVO
Tarnovo 1911

LA FASISMO

JELJU JELEY

LA FASISMO

ESPERANTO

УЧЕБНИК ЗА НАЧИНАЕЩЕ



LAO LA ZAGREBA METODO

Belet

tradukarto
tradukarto
tradukarto
tradukarto

Kiril Velkov

EK AL LEG'!

Legolibro por perfektigo
en Esperanto
Kajro 1911



Bulgara Esperanto-A
Sofio - 1991

Марк Фе

КЪМ ЕДИН ЕЗИК
ЗА ЕВРОПА?

Българското на сарматския Балкан

Бел - София
Година 1991

Hektor Alos Kiril Velkov

EK AL LEG'!

Kajro 1911



Bulgara Esperanto-A
Sofio - 1991

ENHAVO

- 3 Opinio pri la strategio de la nuntempa bulgara E-movado (Georgi Mihalkov)
5 Bulgaraj E-libroj dum 1991
6 D-ro Giorgio Silfer: Pozitiva evoluo spite al la konservativa silento (Ljubomir Trifončovski)
9 Enlanda movado
11 Poezio (Josif Petrov, Nikola Pilev)
12 Beletro (Elin Pelin)
14 Gaston Waringhien - 90-jara
18 Tra la mondo
19 Influo de la slavaj lingvoj sur Esperanto (Nikola Uzunov)
22 Bulgara E-muzeo kaj biblioteko - grava sciencesplora centro
24 Deziras korespondi

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimitar HAĜIEV, Georgi MIHALKOV, Kiril VELKOV, Krastju KARUCIN, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Poŝtadreso de la redakcio: "Ĥristo Botev" 97, 1303 Sofio - Bulgario, tel. 31-87-75

Ofsetpresejo ĉe Firmao "Pres-Esperanto", str. "Angelov vrân" 23, Sofio.

Al la kunlaborantoj: Kontribuajojn por la koncerna numero ni akceptas unu monaton antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario "Bulgara Esperantisto" estas abonebla per la poŝto kontraŭ 36 lv. Por aliaj landoj - pere de naciaj poŝtoj kaj UEA (kodo: prsp-r) aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 ned. gld. aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por eksterlando pagita ĉe la redakcio de "BE" estas 50 lv. Prezo de unuopa ekzemplero 3.00 lv. aŭ 3 ned. gld.

"Bulgara Esperantisto" tutjare estas abonebla ĉe Firmao "Pres-Esperanto".

REKLAMTARIFO

1 paĝo	1/2 paĝo	1/4 paĝo	1/8 paĝo
712 lv.	356 lv.	178 lv.	89 lv.
990 gld.	495 gld.	247 gld.	123 gld.

La Redakcio de "BE" aperigas reklamojn en diversaj lingvoj ofertitajn de bulgaraj aŭ eksterlandaj entreprenoj, organizoj aŭ personoj. Maklerajo por havigo de reklamoj 20%. Movada rabato 50%. Ekstera kovrilpaĝo kostas 50% pli. Rabato por tuja ripeto 20%.

"Bulgara Esperantisto" havas abonantojn en 57 landoj.

Represo el "BE" permesata, indiko de la fonto bezonata.

Estas organizita regula surbendigo de "Bulgara Esperantisto" por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Novaj bulgaraj E-libroj

Foto: Silva ZAKARJAN

ESTRARO

de Bulgara Esperanto-Asocio

Petar Todorov, prezidanto (internacia agado, financoj)

Venelin Mitev, vicprezidanto (kultur-informa agado)

Kiril Velkov, vicprezidanto (instrua, scienca agadoj)

Prof. Kiril Popov, ano (faka agado, neesperantistaj organizoj)

Ljubomir Trifončovski, ano (junulara kaj teatra agadoj)

Georgi Mihalkov, ano (E-kulturdomoj)

Svoboda Damjanova, ano (ĉefdelegito de UEA por Bulgario)

Enjo Enev, ano (terminologia agado)

Adreso: Bulgara Esperanto-Asocio, bulv. "Ĥr. Botev" 97, BG-1303, Sofio, tel. 31-00-29, 32-40-68

Niaj perantoj

BELGIO

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 ANTWERPEN

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 11-1105, 70084-BRAZILIA-DF

BRITIO

Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, SOUTH HUMBERSIDE DN36 5RT

FRANCIO

Federation Esperantiste du Travail, 115, Rue Beranger, F-92320 CHATILLON

Union Francaise Pour L'Esperanto, 4 Bis, Rue de la Cerisaie, F-75004 PARIS

HISPANIO

Jorge Moragues Penella, Pintor Domingo 2-2, 46001 VALÈNCIA

IRLANDO

Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, DUBLIN 6W

JAPANIO

Yoshiaki Mizuno, Hanazono 1-2418-18, TOKORAZAWA, 359

JUGOSLAVIO

Zoran Murgovski, ul. "Dame Gruev" 65, YU-96000 OHRID

PORTUGALIO

Portugala Esperanto-Asocio, A.S. Almeida, R. Dr. Joao Couto, 6, r/c.A, P-1500 LISBOA

SUD-AFRIKO

C.S. Beckford, P.O. Box. 1227, CAPE TOWN, 8000

USONO

Esperanto League for North America, Inc. P.O. Box 1129, EL CERRITO, CA, 94530

Jaro 60

N-ro 12

Bulgara Esperantisto

FONDITA EN 1919, ORGANO DE BULGARA ESPERANTO-ASOCIO

Estimataj legantoj,

Feliĉan Kristnaskan Feston!

Dum la Nova 1992 jaro estu sanaj kaj feliĉaj!

**Prosperu nia kara lingvo kaj nia movado por
paco kaj amikeco mondaj!**

ОТНОВО ОБЩЕСТВЕННОТО НАЧАЛО

Вестта, че от 1 декември 1991 година Съюзната канцелария вече не съществува, е реален факт. За едни това е радикална крачка в правилна посока, за други - грешка, която времето ще поправи.

Ликвидирането на Съюзната канцелария, обаче, не е прецедент.

Първо, тази ликвидация трябва да се разглежда като резултат от един обективен процес. До 1 юли миналата година дружествата, секциите, есперантските домове за култура се бореха за самостоятелност, която получиха от 42-ия конгрес в Шумен. Самостоятелно започнаха да функционират институциите, осигуряващи обслужването на членовете на БЕС. Фирма "Прес-Есперанто" пое издаването на книги и на съюзния орган "Bulgara Esperantisto". Българският есперантски театър, Хорът на българските есперантисти, Българският есперантски музей и библиотека влязоха в ролята си и есперантистите получиха пряк достъп до тях и тяхната дейност. Вече значително намаля необходимостта от посредничество между звената на БЕС и об-

лужващите институции, което се изпълняваше от Съюзната канцелария.

Самостоятелността промени функциите, а функциите промениха структурата. Това ще отчете предстоящият 43-ти конгрес на БЕС, който ще доизгради гъвкава и необременяваща структура.

Второ, ликвидацията на Съюзната канцелария е резултат и на усложнилата се финансова ситуация. Икономическата реалност в страната повлия съществено върху фирма "Глобус", осигуряваща над 90 процента от приходите за Съюза. Това наложи през юли т. г. преразглеждане на бюджета, който и без друго бе значително съкратен в сравнение с предишните години. При това разходите за работни заплати достигнаха повече от две трети, а средствата за дейности почти пресъхнаха. А дружествата и секциите очакваха и продължават да очакват субсидиите си.

Алтернативата бе: дейност или администриране. Ръководството се ангажира с първото, защото именно то определя съществуването на БЕС.

Изниква въпросът, не беше ли възможно да се съвместят дейност и администриране. Не можеше ли частично да се съкратят разходите за Съюзната канцелария и така да се осигури нейното съществуване в значително намален състав?

Тук стигаме до третото.

Ликвидирането на Съюзната канцелария е резултат и от нейната неефективна дейност. Много неща се осъществяваха не от канцеларията, а въпреки канцеларията! Факт е, че в много случаи там се забавяха или въобще не се изпълняваха решенията на Ръководството. Нека си припомним, след колко много пречки от страна на канцеларията се въведоха новите учебни програми, а протакането целеше провалянето на учебната година. Нека не забравяме, че именно Съюзната канцелария провали националните курсове във Варна през юли т. г., за което някои курсисти не бяха уведомени. На мнозина може би е направило впечатление неуплътняване на работното време, когато служителите нито са на местата си, нито са в командирока. Защо за телефон 32-40-68 само за трите летни месеца трябва да се платят над четири хиляди лева?

Като цяло това състояние в Съюзната канцелария бе резултат на два фактора. От една страна Ръководството се стремеше да й осигури самостоятелност, за да се създадат по-добри възможности за изпълнение на задачите. Така се намали високостепенността към служителите поотделно и към канцеларията като цяло. От друга страна, за някои служители липсата на необходимата квалификация явно беше непреодолима пречка, която не им позволяваше да работят компетентно и ефективно.

Сега се разпространява становище, че работата не е вървяла, защото служителите са били малко, особено след реструктурирането през октомври 1990 година. Обаче истината е друга. Работата в Съюзната канцелария не вървеше, защото там се работеше със стария начин на мислене и старите методи, характерни за времето, когато дружествата зависеха изцяло от канцеларията, а самата тя беше Ръководството на Съюза.

Имаше ли нещо положително в дейността на Съюзната канцелария през изтеклата година? Да, две неща, дължащи се на влизането на млади и инициативни хора: много по-добрата отпреди деловодна

работа и книгоразпространението, което получи нова, по-модерна форма чрез книгопощата.

Сега изникват въпроси: оттук накъде, как? Отговорът е еднозначен, казал го е преди век нашият Майстор д-р Л. Л. Заменхоф: напред, с кураж, и нито крачка встрани!

Ликвидирането на Съюзната канцелария не трябва да се драматизира. Българският есперантски съюз няма да загине, работата няма да спре. Съюзът - това не са двадесетина души, а няколко хиляди есперантисти. Те дават, те очакват, те вярват.

Отново се връщаме към общественото начало, както това бе в недалечното минало и както е навсякъде по света. Членовете на Ръководството поемат на обществени начала изпълнението на всички задачи. Няколко сътрудника, само на хонорар, ще извършват информационното и финансовото обслужване. Ще се повиши ролята, а следователно и изискванията към структурите за обслужване на членовете и дружествата: фирма "Прес-Есперанто", съюзния орган "Bulgara Esperantisto", Българския есперантски музей и библиотека, Българския есперантски театър, Хора на българските есперантисти, есперантските домове за култура (които вече преминават на самоиздръжка). Радикално е решен и въпросът с осигуряване на есперантско ръководство на Международната есперантска школа в Писаница, за да стане тя отново наша, само наша, есперантска територия.

Ще имаме и преподаватели по есперанто с държавна диплома, което е едно от най-големите завоевания на БЕС за последните години. Ще се издават нови книги, учебници, речници. Ще гледаме нови спектакли, ще слушаме нови песни. Ще се срещаме с приятелите не само тук, у нас, но и при тях.

Особено важно за нас, българските есперантисти, е да подготвим сериозно двете големи събития, с които сме ангажирани: 11-ия световен есперантски литературен форум през 1992 година и 49-ия световен младежки есперантски конгрес през 1993 година.

Дейност или администриране - това бе алтернативата.

Ръководството избра първото. И трябва да се върви напред, с кураж, и нито крачка встрани!

Ръководство на БЕС

OPINIOJ PRI LA STRATEGIO DE LA NUNTEMPA BULGARA E-MOVADO

Grandiozaj estas la politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj ŝanĝoj de nia nuntempo. La orienteŭropaj landoj serĉas novajn vojojn, ruinigas malnovajn sociajn strukturojn. En la okcidenteŭropaj landoj plifortiĝas la intereso al la vivo de tiuj, kiuj dum duonjarcento vivis malantaŭ la fera kurteno.

Ĉu nun Esperanto havas ŝancon?

Dum tiuj ĉi streĉitaj sociaj ŝanĝoj ŝajne neniu pensas pri Esperanto. Iuj opinias, ke nun Esperanto tute superfluas, laŭ aliaj ĝi iel servas al eta homgrupo kaj triaj eĉ nenion aŭdis pri tiu ĉi lingvo.

Tamen Esperanto aperis ne pro la kaprico de iu persono aŭ grupo da personoj, sed ĝia apero estis socie motivita kaj monde bezonata. Antaŭ pli ol jarcento la homaro bezonis internacian lingvon kaj Esperanto respondis al tiu ĉi bezono. Ĝi kontentigis socian neceson kaj pro tia ĝia ekzisto kaj progreso mirigas nun nenium.

La Lingvo Internacia travivis multajn krizojn kaj danĝerojn, du terurajn mondmilitojn, kruelajn persekutojn en Hitlera Germanio kaj en Stalina Sovetunio. La lingvo, malgraŭ la persekutoj, malgraŭ la minacoj, estis savita kaj ĝin savis ĝiaj sen nombraj konataj kaj nekonataj adeptoj. Esperanto ekzistas en la libroj, en la ĵurnaloj, en la radioelsendoj, en ĉiuj, kiuj bezonas kaj praktikas ĝin.

La Internacia Lingvo en nia lando

La problemoj pri la nuna ekzisto de Esperanto havas internacian kaj nacian aspekton, sed nun nia tasko estas difini la strategion de la nuntempa Esperanto-movado en nia lando.

En Bulgario Esperanto ĉiam havis bonan grundon por enradikiĝo en la socian vivon. Dum pluraj jaroj la lingvo kaj la movado similis al ekzotika floro, zorge flegata de multaj adeptoj. Al Esperanto dediĉis ŝian vivon elstaraj bulgaraj sciencistoj, verkistoj, ĵurnalistoj, sociagantoj. Dank' al ili la rilato al Esperanto preskaŭ neniam estis tute negativa, aŭ tiuj, kiuj rilatis ironie al la Lingvo Internacia formis negrandan grupon, kies influo al la socia vivo ne tre gravis.

Dum sia jarcenta historio Esperanto-movado en nia lando preskaŭ ĉiam sukcesis plenumi la celojn de la Lingvo Internacia. Dank' al tio BEA neniam maljuniĝis. En ĝi ĉiam sentebis la partopreno de junaj homoj, kiuj konstante renovigis ĝin.

Estis tute nature, ke antaŭ du jaroj nian movadon eniris nova pli aktiva grupo da junaj homoj. Ili venis kun novaj ideoj kaj planoj por la estonta Esperanto-agado en nia lando. Gravas la fakto, ke tiuj homoj ne aperis subite. Ili fariĝis esperantistoj dank' al la zorgoj de la antaŭa generacio de bulgaraj esperantistoj. Kelkaj el tiuj junaj homoj eĉ devenas de Esperanto-familioj, kio elokvente montras la fortajn tradiciojn de la Esperanto-movado en nia lando.

Tiu ĉi grupo da junuloj fondis diskutklubon kaj prilaboris la programon de la estonta Esperanto-agado en nia lando. Dum la 42-a Kongreso de BEA en Ŝumen, la programo de la diskutklubo gajnis la aprobon de la bulgara esperantistaro.

Kien post la 42-a Kongreso de BEA?

La situacio, en kiu komenciĝis la nova agado de BEA estis neimageble malfacila - grandega landa ekonomia krizo, subtakso de la sciencaj kaj kulturaj valoroj, malrespondeco kaj neglektemo de la estinta asocia Estraro.

BEA estis en plorinda stato; neleĝa konstruado de la Esperanta Domo en Sofio, fondo de neprofito firmao "Esperanto-turist" kun nekompetenta direktorado, tuta neglekto de la agado de la Esperantaj societoj, kluboj kaj sekcioj. Krome la malnova Estraro, pro neklarigeblaj ankoraŭ kialoj, forpuŝis plurajn kapablajn aktivulojn.

La taskoj, kiuj staris antaŭ la nova Estraro estis sennombraj, tamen unu post alia gravaj problemoj estis solvitaj, sed restis ankoraŭ pluraj.

Sendube la ĉiutaga asocia laboro iom post iom progresas, sed necesas, ke ni klare vidu la taskojn de ĉiuj bulgaraj esperantistoj, iliajn celojn, kiuj estas ligitaj al la celoj de la tutmonda Esperanto-movado, al la celoj de nia nuntempo, ĉar ni apartenas al la mondo, al la epoko, en kiu ni vivas.

La nunaj celoj de la bulgara Esperanto-movado

Unue ni devas korekti grandan eraron. Bulgara Esperanto-Asocio ĉiam strebis esti amasa asocio. Pro tio la varbado estis sencela kaj ne bone motivita. Oni varbis por Esperanto neglektante eĉ evidentajn objektivajn cirkonstancojn. La Esperanto-societoj kreskis, la lingvo-instruado stagnis, en la Esperanto-aranĝoj regis diletantecc.

Nun ni komprenas, ke nia movado ne povas kaj ne devas esti amasa. En ĝi povas membri tiuj, kiuj bezonas la Lingvon Internacian kaj komprenas, ke Esperanto vere povas riĉigi ilin, ĉar la movado havas vastan kulturen historion. Nia movado nun bezonas kulturajn homojn, fakulojn en diversaj sferoj de la vivo. La Lingvo Internacia estas utiligata en la scienco, ekonomio, kulturo kaj la esperantistoj devas havi seriozajn konojn kaj interesojn en diversaj fakoj.

La membroj de nia movado devas kompreni, ke Esperanto ne nur venkas la lingvajn barojn, sed donas sennombrajn eblecojn por fakaj kontaktoj. Tamen tiuj ĉi kontaktoj devas esti altnivelaj kaj profesiaj. El Esperanto profitas nur tiuj, kiuj bone scias kial ili lernas la lingvon kaj kion ili celas. La celo, la motivo por la lernado de Esperanto devas esti bone difinita. La lernado postulas energion, monon, tempon kaj nun malmultaj homoj povas investi por neklaraj kaj dubaj celoj.

Instrui Esperanton profesie

La instruado de la lingvo devas esti altnivela. Tio ne dependas nur de la instruistoj, dependas same de la kursanoj. La Esperanto-kursoj ne devas esti nur lernejoj, civitanaj, sociaj, necesas novaj formoj aŭ tiel nomataj fakaj kursoj, ekzemple komercaj Esperanto-kursoj, en kiuj la homoj, kiuj lernas la lingvon, ricevos informojn kiel eblas komerci uzante Esperanton, kiel eblas uzi la lingvon en la scienco, aŭ kiel eblas per Esperanto pliriĉigi siajn konojn en la literaturo, interlingvistiko ktp.

Agi kulture

Esperanto estas kulturo. Tiuj, kiuj lernas kaj uzas la lingvon, havas eblecon ekkoni novajn kulturajn valorojn, eksenti la ĝojon de la kontakto kun nekonata kultura mondo.

Necesas profesiaj kulturaj Esperantaj eventoj - teatraj prezentoj, koncertoj, prelegoj, tamen ne multnombraj, ne bruaj kaj amasaj. Ili estu por tiuj, kiuj bone komprenas la signifon de la kultura influo. Dank' al tiuj kulturaj eventoj, ili komprenos la ideojn de la lingvo, la tradiciojn de la Esperanto-movado.

La Esperantaj kulturaj aranĝoj devas esti ritaj, bone, precize organizitaj, ili devas impresi ne nur profesie, sed oni devas senti en ili la spiriton de profunda estimo kaj amo inter la partoprenantoj kaj la neordinaran esperantistan solidarecon.

Informi saĝe

Serĉi eblecojn ĉiam saĝe kaj efike informi pri la lingvo. Ne per artikoloj pri dubindaj kaj negra-

vaj Esperanto-aranĝoj, ne per artikoloj kun kliŝaj kaj konataj frazoj, sed per informoj pri la praktikaj servoj de la lingvo, pri elstaraj personoj, uzantaj la lingvon en sia ĉiutaga vivo. Informoj pri la streboj de la homoj per Esperanto trovi novajn vojojn unu al alia en la ĉiutaga lukto por ekzisto.

La radio kaj televido en Bulgario ne interesiĝas pri Esperanto, sed tie certe laboras iuj, kiuj bone komprenas kion signifas Esperanto kaj en sia laboro ili trovas eblecon montri reale kio estas Esperanto.

Eldoni, eldoni

Ne eblas krei movadon sen organoj. Necesas revuoorganiza kaj revuokultura. La revuoj unuigas, aktualigas, perfektigas. Necesas libroj - ĉefe originalaj - beletraj kaj sciencaj. La beletraj enhavas la tradiciojn, la pensmanieron, la sentojn de la homgrupo, kiuj elektis kaj flegas tiun ĉi lingvon.

La sciencaj libroj prezentas la konojn, la saĝecon, la novajn ideojn de la homoj, kiuj esprimas sin per tiu ĉi lingvo.

Necesas lernolibroj - modernaj, interesaj, diversnivela, verkitaj kompetente, profesie, serioze.

Kiel subvencii la movadon?

Ĝis nun ni atendis monon de firmao "Globus", sed nenion ni faris por helpi ĝin. Tamen ĉu estas nur "Globus"? Ekzistas tiom da eblecoj - Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica, la Esperanta Domo en Koprivštica, firmao "Pres-Esperanto" ktp. Ili estas niaj kaj ni devas zorgi pri ili, profiti ilin. Nenio malbona estas en la vorto profiti, la lingvo profitas nin, al ĝi ni donas niajn kapablojn, konojn, amon, nian tutan energion.

Ni ĉiuj devas farti hejme en nia movado, ĉar ni estas ĝiaj mastroj. La verkistoj devas verki, la ekonomiistoj devas estri niajn entreprenojn, la instruistoj devas instrui. Esperanto bezonas nin ĉiujn.

Novaj homoj - nova strategio

La nova strategio bezonas novajn homojn, la novaj homoj bezonas novan strategion. Ni ĉiuj serĉu ilin, venigu ilin en nian movadon, sed saĝe, ne per malnovaj varbmetodoj. Ni helpu ilin. Ni ne diru, ke Esperanto facilas kaj ni instruu la lingvon nur al tiuj, kiuj bezonas ĝin.

Ni kune kreu la etoson de amo, estimo, interkompreno kaj ĉiu nia strategio estu dediĉita al tiu ĉi celo.

Georgi MIHALKOV

BULGARAJ E-LIBROJ DUM 1991

Eĉ en la nuna enlanda streĉa ekonomia situacio la eldonado estas prioritatafako en la agado de BEA. Dum 1991 aperis 11 E-libroj, proponitaj al nia legantaro flanke de la Asocio kaj produktitaj de firmao "Pres-Esperanto". Tio estas:

Prof. Kiril Popov - "Sanfavora vivmaniero" (6,80 lv.; 8 gld.)

Hektor Alos kaj Kiril Velkov - "Ek al leg'!" - du volumoj (20 lv.; 20 gld.)

Venelin Mitev - "Tradukarto" (12 lv.; 25 gld.)

Nikola Aleksiev - "Mallonga historio de la bulgara E-movado" - bulgarlingve (6,70 lv.)

Adapto por bulgaroj Mariana Evlogieva - "Esperanto laŭ Zagreba metodo" (3,50 lv.)

Mark Fettes "Al unu lingvo por Eŭropo? La estonteco de la eŭropa Babelo" - bulgarlingve (2,50 lv.)

Dimitar Simeonov - "Humanismo" (11,30 lv.; 7,80 gld.)

"Panorama Esperanto" - bulgarlingve (8,30 lv.)

El la biblioteko "Survoje" aperis du poemaroj:

Nikolao Stranĝanski "La somero jam foriris" (5 lv.; 5 gld.)

Marija P. Angelova "Kien ni iras" (3 lv.; 5 gld.)

La libroj troveblas en la librovendejo de BEA - 1303 Sofio, str. "Hr. Botev" 97, tel. 31-00-29; labortempo 9-18 h.

NOVA TRADUKO

Jam komence de nia jarcento (1908) aperis en Esperanta traduko la verko de Karl Marks kaj Friedrich Engels "Manifesto de la Komunista partio", publikigita en Londono en 1848. Nova tria traduko de tiu verko estas realigita far la eldonejo "Progreso" (Moskvo) en 1990. Ĉi tiu traduko estas aperinta sub la plumo de tre populara esperantologo Detlev Blanke, hermana esperantisto, d-ro de filologiaj sciencoj, docento en Berlina universitato.

Tie ĉi mi ne tuŝos la enhavon mem de la Manifesto, ĉar pri ties unika signifo en la sociologia literaturo plej elokvente parolas la fakto, ke ĝi estis tradukita en 1209 lingvojn kaj aperis en 1200 eldonoj. Tamen oni povus demandi: "Ĉu en la epoko de disfalo de la iamaj socialismaj ŝtatoj estas aktuala simila traduko kaj ties eldono? Ĉu la tradukinto kaj la eldonejo perdis ĉiun senton pri realeco?" Jen la respondo de d-ro Blanke:

"La perversigo de ideoj per netaŭgaj homoj en netaŭga praktiko ne nepre senbazigas tiujn ideojn. La ideoj de Marks kaj Engels vere nenie ĝis nun estis realigitaj. Do - almenaŭ por multaj - ili restas aktualaj kaj estas denove ekzamenataj, sed, kompreneble, kritike." Mi plene konsentas kun la opinio de d-ro Blanke. Tamen mi dezirus esprimi mian rilaton al la efektivigo de tiu tria kaj plej fidin-

da traduko de la Manifesto.

La tradukinto kondukas tre honeste al la nefacila laboro de siaj du antaŭuloj Arturo Baker (usonano) kaj la aŭstrian Pfeiffer. Li alte estimas ilian pioniran kaj bonkvalitan laboron. Kelkloke la originala teksto estas malfacile radukebla alilingven. Tial d-ro Blanke faris aldonajn, klopodojn superi tiujn malfacilaĵojn. Fine de la XX jarcento tiu tasko estis pli facile efektivebla kompare kun la komenco de la jarcento.

La rezulto de la klopodoj de d-ro Blanke distingiĝas ne nur pro la pli zorge kaj ĝuste tradukita teksto, sed ankaŭ pro la aldonadoj al la traduko. Li prezentas ĉiujn antaŭparolojn, faritajn de la aŭtoroj al diversaj nacilingvaj tradukoj de la verko:

La tradukinto faras ankaŭ proprajn klarigojn pri historiaj personoj kaj eventoj, akompanataj de portretoj kaj biografiaj notoj.

Ne lastloke laŭ signifo mi tuŝas la enhavon de la postparolo de d-ro Blanke. Fakte ĝi prezentas eselon pri la Esperantaj tradukoj de la Manifesto, pri korektendaj lokoj en la antaŭaj du tradukoj. Simila laboro estas farita por la unua fojo en tiu tria laŭvica traduko de tiu ĉi rimarkinda verko. La postparolo povus esti indikita kiel ekzemplo de scienca kaj konscienca tradukita laboro.

Nikola ALEKSIEV

La 12-an de februaro 1992 estos la centjara datreveno de la eminenta bulgara esperantisto Atanas D. Atanasov - ADA, membro de la Akademio de Esperanto, aŭtoro de lernolibroj, esperantologiaj studoj, talenta tradukisto.

Okaze de tiu ĉi jubileo Bulgara Esperanto-Asocio kaj Sekcio "Literaturo" ĉe BEA anoncas Literaturan Konkurson "Atanas D. Atanasov - ADA"

Konkursaj ĝenroj:

I. Traduko el bulgara en Esperanton de mallonga rakonto.

II. Eseo pri esperantologia temo.

III. Eseo pri libera temo.

Estos aljuĝitaj premioj.

Kondiĉoj por partopreni la Konkurson:

1. La konkursaj verkoj ne

Internacia Literatura Konkurso "Atanas D. Atanasov - ADA"

devas esti partoprenintaj en aliaj konkursoj.

2. La verkoj devas ampleksi maksimume 10 paĝojn po 30 liniojn.

3. Oni akompanu la tradukojn kun la originala bulgarlingva rakonto.

4. Ĉiuj konkursaĵoj devas havi la titolon kaj pseŭdonimon de la aŭtoro. En fermita eta koverto estu la vera nomo kaj adreso de la aŭtoro. Oni skribu la titolon de la verko kaj la pseŭdonimon de la aŭtoro sur la granda koverto.

5. Oni sendu la verkojn en tri ekzempleroj ĝis la 31-a de januaro 1992 al adreso:

1303 Sofio,
bul. "Hristo Botev" 97,
Bulgara Esperanto-
Asocio
por la Literatura Konkurs
"ADA"

D-RO GIORGIO SILFER: POZITIVA EVOLUO SPITE AL LA KONSERVATIVA SILENTO



Giorgio Silfer (1949) estas unu el la plej elstaraj figuroj de la moderna Esperanta komunumo. Dufoje doktoriĝis pri interlingvistiko, aŭtoro de ses libroj kaj multaj sociologiaj esploroj. Prezidanto de la Kooperativo de Literatura Foiro. Unu el la iniciatintoj de la Manifesto de Raŭmo, kiu signis la trajtojn de la nova epoko por Esperanto. Motivo por ĉi-intervjuo estis la okazonta en Vraca fine de junio de 1992 Internacia Literatura Forumo. Tiu intervjuo estas ege aktuala, ĉar tuŝas problemojn de la evoluigo de Bulgara Esperanto-Asocio.

Ljubomir Trifonĉovski: Pli ol dek jaroj pasis post la Manifesto de Raŭmo. Ĉu dum tiu ĉi tempo io ŝanĝiĝis kaj jam ne estas bezonata nova tia fundamenta dokumento?

D-ro Giorgio Silfer: La Manifesto de Raŭmo estis lanĉita la 1-an de aŭgusto 1980 - antaŭ dekunu jaroj. Ĝi ne estas dokumento oficiala de iu kongreso, sed dokumento, kiu priskribas la opinion de ĝiaj subskribintoj. En si mem la Manifesto estas tre mallonga skizo pri diversaj ideoj maturiĝintaj jam en la sepdekaj jaroj. Tiuj ideoj trovis redifinon kaj plilarĝigon per postaj dokumentoj, ekzemple la Deklaro de Pola Studenta Esperanto-Komitato, la studoj de Sandor Revesz kaj Jerzy Leyk. Kaj

krome, per pliaj konferencoj pri strategiaj demandoj de Esperanto-komunumo; almenaŭ mi menciis du: en Varsovio en 1984 kaj en Szeged en 1988 (kiun vi mem persone partoprenis). Do, entute paroli pri la Manifesto de Raŭmo ne tiel trafas, ĉar ĝi estas kvazaŭ punkto de fluanta rivero: estis ellaborado pli frue, ekzemple en kulturpolitikaj raportoj de "Literatura Foiro", kaj densa ellaborado poste. Mi opinias, ke tio estas la ĝusta takso pri la situacio dum la okdekaj jaroj. Ili entute alportis novan dimension. Kaj efektive nun, en 1991, mi povas diri, ke kelkaj gravaj ŝanĝoj realiĝis. Ili ne estas tiel radikalaj kaj ekskluzivaj, aŭ absolutaj, por malpermesi la ekziston de aliaj konceptoj. Ŝanĝiĝis, ekzemple, la bildo de Esperantio. Ĝis Raŭmo praktike mi konis nur unu: Esperantio estis iu propaganda movado, aŭ almenaŭ iu premgrupo (ĝi ne estis amasmovado, ĉar la dimensioj neniam estis tiel grandaj), kiu simple iris al la mondo por konvinki ĝin pri la ekzisto de iu utila filantropia aŭ genia teknologia trovaĵo. Ni volis konvinki la mondon, ke Esperanto estas la solvo de iu terura problemo - la monda lingva problemo, pri kiu multaj konsciis ĝenerale. Ni volis aliri instituciojn, konvinki registarojn, aŭtoritatojn por

poste eventuale tra lernejoj devige enkonduki la instruadon de Esperanto. La ideo estis ke iam la esperantistaro fariĝos majoritato en la mondo. Aŭ ke Esperanto fariĝos efektive dua lingvo por ĉiuj. Tiu slogano, kiu estis kontestita ĝuste kadre de la Manifesto de Raŭmo, ne taŭgas por klarigi la novan bildon sociologian. Hodiaŭ Esperantio havas ankaŭ alian dimension. Oni komencas koncepti la esperantistaron ne nur kiel disciplinitan movadon, kiu devas konkeri la mondon, sed ankaŭ kiel komunumon, funkciantan pli-malpli kiel disa minoritato tra la mondo. Tia diasporo, kiel disa minoritato, havas unu ĉefan komunan referencon en la lingvo, en la komuna lingvo, en Esperanto. Do estas profunda modifo de la sociologia bildo de Esperantio. La raŭmismo opinias, ke la esperantistaro restos minoritato dum longa tempo. Oni ne scias, kiom da tempo, sed sendube tre, tre, tre longe. Cetere, ne estas eble indiki movadon, kiu fariĝis majoritato; eĉ la kristanismo ne havas majoritaton en la mondo. Do nenio vere konkeras la mondon iam, krom se ĝi respondas al iu baza fundamenta bezono. Kaj certe la bezono pri komunikado ekzistas, sed la kontentigo, kiun donas Esperanto, estas iu aparta kontentigo. Homo, kiu lernas

anglan, aŭ francan, aŭ germanan, plenumas certan bezonon de komunikado, ekzemple sur profesia nivelo, sed ne plenumas la transnacion bezonon de komunikado, kiun eblas realigi pere de Esperanto. Esperanto estas la lingvo, kiu permesas rekte kaj profunde alparoli la homon kaj ne nur la kelneron en la restoracio aŭ la kontiston en la hotelo. Do en tiu ĉi dimensio ĉio ŝanĝiĝas. Evidente la bazaj bezonoj de la esperantistoj, komprenataj kiel premgrupo, propaganda movado, estas tute aliaj ol la bazaj bezonoj, kiujn havas la esperantistoj, komprenataj kiel minoritato diaspora tra la mondo. Por konkludi: se la esperantistaro devas esti konceptata unuavice kiel propaganda movado, la homoj devas esti objekto en tiu movado. Ili estas unuavice plia unuo, kiu aliĝas por propagandi mem, por instruadi, por realigi disvastigon de la lingvo kvante. Se, male, Esperantio estas konsiderata kiel komunumo, la akcento estas donata al la bezonoj de tiu komunumo, do al la bezonoj de ĝia kresko el kvalita vidpunkto kaj el kvanta vidpunkto. Tiam la novaj membroj de tiu komunumo estas ne objekto, sed subjekto. La homo, kiu aliĝas al tiu komunumo, ne venas, ĉar ni bezonas tute simple iun plian homon, sed ĉar ni bezonas iun plian homon, kiu vivu nian kulturmodelon. Estas tiu la esenca diferenco ĝuste inter la konservativa linio kaj la raŭmismo. En la konservativa linio la ideo estas, ke ni devas esti pli multaj, ĉar ju pli multaj ni estas, des pli forte ni povas premi. El la raŭmismo ideo ni devas esti pli multaj, ĉar ju pli multaj ni estas, des pli multaj vivas nian vivmodelon, nian kulturmodelon. Konklude al via duobla demando, mi opinias, ke oni ne povas diri, ĉu necesas novaj dokumentoj, ĉar la bezonoj de novaj dokumentoj troviĝas per

si mem. Mi opinias, ke dum la okdekaj jaroj, en la fazo de pura teorio, multo estas sufiĉe elaborita, do oni devas en fazo multe pli praktika produkti nome tiujn servojn, tiujn valorojn, kiuj utilas por altigi la kvaliton.

Ljubomir Trifonĉovski: Post Raŭmo oni ekparolis pri novtipaj organizoj de Esperanto-komunumo, tamen evidentiĝas, ke la Kooperativo de Literatura Foiro restas la sola novtipa organizo. Ĉu tio ne faras de vi pesimisto?

D-ro Giorgio Silfer: Mi opinias, ke vi troigas la virton kaj la ekskluzivecon de la Kooperativo de Literatura Foiro. Kiam temas pri novtipaj organizoj, ni devas interpreti tion en almenaŭ du manieroj. Unue tiuj organizaĵoj, kiuj ne rekte ligiĝas al la trunka movado propaganda, konservativa kaj eventuale pracula. Ekzemple, la diversaj aŭtonomaj kulturcentroj, kiuj naskiĝis precipe ekde 1978, kiel Kultura Centro Esperantista, La Kvinpetalo, La Vojnodo, la centro en Poprad, kiuj plenumas du bezonojn de la Esperanto-komunumo - la perfektigo en la lingvo kaj la kleriĝo. Ili estas kvazaŭ havenoj por la Esperanto-insularo. Tiuj centroj estas efektiva novaĵo, kiu ne ekzistis pli frue, se escepti la realaĵon de Greziljono kaj la forpasintan realaĵon de Primoŝteno. Do tio estas la unua aspekto. Alia aspekto, grava en tiuj novtipaj organizoj, estas la strukturo. Ĝis nun oni insistis pri strukturo laŭ funkcioj - bazita sur la hierarkia akso: ke ekzistu piramido kun bazo de lokaj kluboj kaj aktivuloj, interna bazo de naciaj societoj aŭ teritoriaj organizaĵoj kaj pinto kun tutmondaj organizaĵoj (fakte du ekzistas - Universala Esperanto-Asocio kaj Sennacieca Asocio Tutmonda). Montriĝas, ke iom post iom realiĝas nova koncepto, nepiramida, sed, se vi volas resti en la kampo de solida geometrio, sfera. La bazo ne estas

submetita al iu verda hierarkia, sed kvazaŭ reto kovras tiun sferon, eventuale egaldistancon de iu centro, kiu utilas ne por ordoni, sed por kunordigi kaj konsili. En certa maniero, en certa mezuro, la Kooperativo de Literatura Foiro plenumas tiun ĉi tipon de organizado, sed ĝi ja ne estas sola - ekzistas aliaj stabloj en Esperantio, kiuj pli kaj pli preferas la retan sistemon, preferas la lozan konfederacion al la centralismo, kiu karakterizis kaj pli karakterizas Universalan Esperanto-Asociacion tra Lapenna unuavice, kaj post Lapenna - en la lapenismo sen Lapenna.

Ljubomir Trifonĉovski: La Esperanto-organizoj en la orienteŭropaj landoj serĉas sian lokon en la demokratiaj procezoj de siaj propraj landoj. Tamen, la ŝanĝiĝo malrapidas; iuj fiaskis, aliaj kolapsas. Ĉu tio estas rezulto de renaskiĝo aŭ de ties morto? Aŭ ili alproksimiĝas al novtipeco, aŭ male?

D-ro Giorgio Silfer: La evoluo en Orienta Eŭropo ĝenerale estis ĉiam pli pozitiva ol en Okcidento. Nehazarde ĝuste en Orienta Eŭropo naskiĝis Esperanto mem. Nehazarde la ĉefaj teoriistoj de la raŭmismo estis homoj kiel Jerzy Leyk - polo, Sandor Revesz - hungaro, la konferencoj en 1984 kaj en 1988 okazis respektive en Varsovio, Pollando kaj Szeged, Hungario. Do, ĉiukaze rilate la ŝanĝon, la evoluon al novtipa organizado, Orienta Eŭropo estis, laŭ mi, pli preta kaj pli matura ol la Okcidenteŭropa pracula esperantistaro. Nun venis 1989, la tiel nomata "annus mirabilis" (jaro mirinda), kiam je makrosocia nivelo realiĝis certaj transformoj, influantaj ankaŭ je mikrosocia nivelo. Sed ni ne forgesu, ke jam pli frue estis eksperimentoj - plej grava verŝajne tiu de Pola Esperanto-Asocio en 1981-1984. Ĝi finiĝis per interveno de la ŝtataj instancoj, vokita de esperantistoj, kiuj kontraŭis tiun novan kurson. Mi opinias, ke ni devas

komenci fakte de tie, kie ĉesis la eksperimento de Pola Esperanto-Asocio en 1984. La ekzemplo, la modelo, kiun oni povas sekvi, estas ĝuste tiu, de la jaroj, kiam Jerzy Leyk estis prezidanto de Pola Esperanto-Asocio. Alia ekzemplo, sugestita jam plurfoje, kiun oni povas sekvi, estas la sendependiĝo de la diversaj servoj, kiujn mastumas unu sola asocio. Tiel ili povus multe pli prosperi kaj progresi ol en centralizita movado. Super ĉio ĉi estas la granda demando, kio okazos en Orienta Eŭropo? Sed mi opinias, ke kiel ajn evoluos la makrosociaj cirkonstancoj, en Orienta Eŭropo ekzistas tiel forta tradicio de Esperanto, ke Orienta Eŭropo restos ĉiam verŝajne la plej grava parto ene de la Esperanto-komunumo tutmonda. Kaj ankaŭ en tio mi estas sufiĉe optimisma.

Ljubomir Trifonĉovski: Ĉu eliroj de la problemoj por la Esperanto-komunumoj en la Orienteŭropaj landoj ne estas ekzisto de alternativaj Esperanto-organizoj novtipaj, kiuj donos pli da eblecoj por la esperantistoj en tiuj landoj?

D-ro Giorgio Silfer: Do parte mi respondis, kiam mi aludis pri la eblo ke diversaj servoj fariĝu memstaraj. Sed la ideo ne estas multigi la organizojn, ĉar tio povus esti malsano de la esperantistoj; kiam ili havas ion novan, ion konkretan, ili ne kapablas alimaniere plenumi sian celon ol fondi novan asocion. Ekzemple la bibliotekistoj en Esperantio fondis sian internacian asocion kun la klasika duobla celo: unuflanke propagandi Esperanton inter la bibliotekistoj kaj la bibliotekoj, aliflanke plenumi iun rolon de faka terminologia laboro pri la bibliotekonomio. Mi opinias, ke tio estas mispaŝo. Pli moderna sinteno estas, ke tiuj bibliotekistoj, kiuj estas esperantistoj, kunigu sian forton por plenumi iun precizan projekton. Ekzemple ĝis nun mankas katalogo ĉiujara, kiu enhavus detalan liston de la libroj, eldonitaj en Esperantio en la

koncerna jaro. Tiu katalogo ekzistas en ĉiu lando; en Svislando estas la tiel nomata "Svisa libro" en pluraj lingvoj, ĉar la lando estas plurlingva. Devus aperi iu katalogo, titolita "La Esperanto-libro" - por 1990, 1991 ktp... Kaj tion povus plenumi ĝuste kiel projekton la bibliotekistoj. Kiam tiu projekto estos plenumita, unu afero estos en ordo. Por esti vere novtipa organizaĵo, necesas labori laŭ projekto, pli ol laŭ funkcio, necesas doni al si iun specifan celon. Homoj kolektiĝas por plenumi celon kaj kiam ĝi estas plenumita, la taskoforto estas libera por aliaj celoj.

Ljubomir Trifonĉovski: En Orienta Eŭropo draste sentebblas manko de novaj kompetentuloj en la diversaj kampoj de Esperanto-kulturo. De alia flanko la Kooperativo de Literatura Foiro, kiel novtipa organizo, speciale zorgas pri solvo de tiu problemo. Kiamaniere vi komentos mian aserton?

D-ro Giorgio Silfer: La problemo ne estas specife Orienteŭropa. Mi eĉ dirus, ke en Okcidenta Eŭropo povas ekzisti pli forta problemo ol en la Orienta. Se vi konsideras, kiuj estas kelkaj novaj nomoj de intelektuloj - simple vi trafluu la lastajn kolektojn de "Literatura Foiro" aŭ la lastajn numerojn por trovi ekzemplojn - vi vidos, ke aperas nomoj kiel Istvan Ertl, Blazio Vaha, Wojtech Usakiewicz, vi, Julian Modest - homoj el Orienta Eŭropo, dum el Okcidenta Eŭropo la junuloj aŭ homoj sub kvardekjara aĝo ne estas tiom multenombraj - vi trovos Herbert Mayer, Georgo Kamaĉo, Andy Kunzli. Multaj, kiuj aktivas en Sovetunio - Aleksandr Fjodorov, Aleksandr Korĵenkov, Nikolaj Lozgaĉev ktp, estas intelektuloj kaj esperantologoj. La problemo estas kiel influigi ĉi tiujn homojn al Okcidento kaj kiel interrilatigi ilin pli ofte. Kelkaj landoj estas malpli bonŝancaj. Povas esti ankaŭ la kazo de Bulgario, kie

klopodoj, signoj kaj diversaj simptomoj lastatempaj donas la impreson, ke ankaŭ ĉe vi estas iu esperiga evoluprocezo.

Ljubomir Trifonĉovski: Vi menciis Bulgario kaj mi daŭrigos ĉi-direkten. En junio 1992 en Vraca okazos la Dekunua Internacia Literatura Forumo, kiu pridis-kutos la problemojn de la porinfana esperantlingva literaturo. Kion vi atendas vidi en Bulgario kiel evoluon de Esperanto-kulturo kaj komunumo? Kion vi atendas vidi kiel rezulton de la kunlaboro kun la bulgarioj?

D-ro Giorgio Silfer: La kazo de Bulgario ĉiam estis relative mistera, ĉar certe ekzistas granda kvanto, al kiu ne respondas adekvata kvalito: la fruktoj ne estas tiom multaj, kompare kun la semado. Via enlanda situacio estas komparebla kun la hungara, sed la kvalito ne estas komparebla kun tiu de la hungaroj. Ne ekzistas iu bulgara Kalocsay aŭ iu bulgara Baghy, ne estas iu bulgara Szerdahely. Sed pluraj simptomoj pri ekzisto de iu minimuma tradicio estas - la arto de Veselin Damjanov kaj de Bulgara Esperanto-Teatro kontribuis al la Esperanto-kulturo kaj oni ne povas forgesi kaj neglekti tion. Estas homoj kiel Julian Modest, Venelin Mitev, Kiril Velkov, vi mem. La Kooperativo de Literatura Foiro konsideras Orientan Eŭropon kiel ĉefan relon de Esperanto-komunumo, kaj tiu ĉi geopolitika konstato havas konkretan aplikon en la Internacia Literatura Forumo en Vraca. Ĝi estos okazo por renkontiĝo de viaj esperantologoj, de viaj intelektuloj kun kolegoj el aliaj partoj de Esperantio. La Internacia Literatura Forumo plenumos trafe sian celon, se ĝi sukcesus en certa mezuro stimuli la bulgaran intelektularon. Mi atendas, ke la Forumo donos iun etan kontribuon al tiu direkto, por ke iam ekzistu iu bulgara Kalocsay, aŭ iu "Bulgara vivo" analoga al la forpasinta "Hungara vivo",

ESPERANTAJ LIBROJ - EN NIA HEJMO

Kiel akiri tiun celon, per riĉa, interesa kaj varia programo la 26-an de oktobro j.k. en la Pedagogia Instituto en Vraca diskutis la partoprenantoj en la Internacia seminario pri la propraj Esperanto-bibliotekoj. Ĝin organizis Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko, Literatura Sekcio ĉe BEA kaj la loka Esperanto-societo "Sukceso". Salutis la alvenintajn esperantistojn el Bulgario, Maroko kaj Rumanio la prezidanto de BEA inĝ. Petar Todorov kaj la direktoro de la Pedagogia Instituto en Vraca docento dr.sc. Zlatka Petrova.

Enkondukis la temon pri la propraj Esperanto-bibliotekoj Georgi Mihalkov, direktoro de Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko. Li substrekis la grandan rolon de la propraj librokolektoj por la edukado kaj formiĝo de la esperantistoj. Ljubomir Trifonĉovski akcentis en sia eldiro al la formoj de akiro de libroj en Esperanto kaj al la manieroj malfermi la proprajn Esperanto-bibliotekojn por la aliaj. Raja Androvska, fakulo pri bibliografio, esprimis kelkajn praktikajn konsilojn al la librokolektantoj. Nikola Nikolov proponis organizi reton por uzado de libroj el propraj Esperanto-bibliotekoj, kaj Elka Sotirova atentigis la ĉesstantojn pri la bezono scii, kion havas la bibliotekoj de la societoj. Stefka Ĉenkova emociis parolis pri la bezono legi librojn, ĉar tio

estas la plej efika maniero lingve perfektigi.

Por montri, ke la bulgaroj jam havas pli bonajn eblecojn akiri valorajn librojn en Esperanto, la organizantoj sukcesis certigi tre riĉan libroservon. Tie estis vendataj novaj bulgaraj libroj kaj eldonaĵoj de Kooperativo de Literatura Foiro - Milano.

Premieris la ĵus aperinta libro "La somero jam foriris" de Nikola Stranĝanski. Venelin Mitev koncize prezentis la verkon, kaj la aŭtoro deklamis kelkajn siajn sonetojn.

La juna Aleksandar Ŝivarov prezentis sin publike unuan fojon kiel libroŝatanton: li analizis la libron "La spegulo de Velodajo" de Giorgio Silfer kaj metis ĝin inter la plej grandajn atingajojn de la moderna Esperanta literaturo.

La partoprenantoj detale konatiĝis kun la programo kaj planoj de la starigita fako "Interlingvistiko" en la Pedagogia Instituto en Vraca.

Enkadre de la seminario okazis ankaŭ Internaciaj Ekzamenoj de Esperanto, laŭ la normoj de ILEI/UEA. La kuraĝuloj el nia lando kaj Rumanio sukcesis.

Eva Bojaĝieva, estrarano de la Internacia Esperantista UNESKO-klubo, informis pri ĝia agado kaj pri la planoj de aktiva bulgara partopreno en ĝi, des pli ke BEA estas inter ĝiaj iniciatintoj. Ŝi ankaŭ anoncis la fondiĝon de Bulgara Esperantista UNESKO-klubo.

Kunsidis la Estraro de BEA. La estraranoj aparte renkontiĝis kun la Estraro de la Pedagogia Instituto en Vraca kaj priparolis la estontan aktivan kunlaboradon kun la nura altlernejo en Bulgario, preparanta instruantojn de Esperanto kun ŝtata diplomo.

L. ALEKSANDROV

EKAPERIS "E- TRIBUNO"

Antaŭ kelkaj jaroj en nia lando aperis pluraj Esperanto-bultenoj: "Internacia Journalisto", "Filologo", "Pacaktivulo", "Esperanto progresas", "Kolektanto" kaj aliaj. Ili elokvente pruvis, ke nia lingvo vivas, ke en nia lando estas granda deziro por disvastigo kaj popularigo de Esperanto. Iom post iom, ĉefe pro financaj kialoj, tiuj ĉi bultenoj malaperis. Restis "Bulgara Esperantisto" kaj eĉ "Panorama Esperanto" estas eldonata foje jare.

Ni tamen bone scias, ke sen revuoj, sen bultenoj, sen libroj Esperanto ne povas ekzisti kaj feliĉe ĉiam estis entuziasmaj adeptoj de la Lingvo Internacia, kiuj malgraŭ la malfacilaĵoj, sukcesis lanĉi Esperanto-revuojn kaj dum iom da tempo aŭ dum pli longaj periodoj eldonis ilin. Tial mi estis ege ĝoja, kiam mi vidis la pasintjara numeron de "Esperantista Tribuno" - eldono de Esperantista Kulturdomo en Razgrad.

Tiam mi scivole trafolumis ĝin kaj mi restis agrable surprizita de ĝia riĉa enhavo. Unue mi opiniis, ke "Esperantista Tribuno" respegulas nur la Esperanto-movadon en urbo Razgrad kaj en la regiono, sed evidentiĝis, ke tiu ĉi bulteno celas doni pli vastan informon pri la tuta Esperanto-movado en nia lando. Ekzemple en la pasintjara numero oni povas legi interesan kaj detalan intervjuon kun inĝ. Petar Todorov, prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio, la platformon de la Diskutklubo "La dua jarcento de Esperanto kaj ni", impresojn pri la 42-a Kongreso de BEA en

Ŝumen ktp. Apud tiuj ĉi aktualaĵoj artikoloj estas riĉaj informoj pri la agado de la Esperantista Kulturdomo en Razgrad kaj beletra rubriko, en kiu aperis verkoj de konataj verkistoj el Razgrad.

La ĉi-jara numero de "Esperantista Tribuno" estas pli ampleksa, pli varia kaj pli alloga. La artikoloj en ĝi estas de elstaraj esperantistoj kiel Venelin Mitev, Nikola Uzunov, eseo de Stefan Ĉirpanliev kaj aliaj.

En ĉi-jara numero la kontribuoj estas Esperantlingvaj kaj bulgarlingvaj. La bulgarlingvaj artikoloj, interesaj kaj informriĉaj, kiel ekzemple la artikolo de Radka Stojanova, Dimitrina Kateva, Ana Zamfirova kaj aliaj, malfermas fenestron al la Lingvo Internacia antaŭ la neesperantistoj. La Esperantlingvaj artikoloj, verkitaj en bona, preciza Esperanto, traktas aktualajn problemojn de nia lingvo kaj movado, kiel ekzemple la artikolo "Kiel iri pluen" de Milena Georgieva kaj "Lingvo kaj medio" de Rosica Savĉeva.

En tiu ĉi numero same ne mankaŭ beletraĵoj - ĉefe la premiitaj verkoj de la Literatura Konkurso "Abritus '91", bonege ilustritaj de Nikola Stefanov kaj Anton Petkov.

"Esperantista Tribuno" vere meritas la atenton de ĉiuj esperantistoj kaj mi kiel membro de la Estraro de BEA kaj respondeculo pri la Esperantaj Kulturdomoj, deziras profunde danki al la redakta komitato de la bulteno, al d-ro Ivan Kirĉev, Ivaniĉka Maĝarova, Dimo Dimov, Radka Stojanova, Lilija Nikolova kaj al ĉiuj samideanoj en urbo Razgrad, kiuj malgraŭ la malfacilaĵoj trovis fortojn, amon kaj rimedojn por eldoni tiun ĉi allogan bultenon.

Mi nur esperas, ke estonte "Esperantista Tribuno" estos iom pli bone presita kaj ĝi aperos en pli da ekzempleroj, por ke aliaj esperantistoj el nia lando same ĝuu ĝin.

G. I.



RENE JORDANOVA - 80-JARA

La 20-an de oktobro 1991 en Stara Zagora, la E-societo kaj la bulgara parto de la Internacia E-Ĥoro sub la gvido de s-ro Terziev, solene festis la 80-jariĝon de la eksoperkantistino kaj multjara esperantistino Rene Jordanova.

Ŝi naskiĝis la 20-an de oktobro 1911 en Sofio. Multe da jaroj ŝia familio loĝas en Stara Zagora. Sur la scenejo Rene Jordanova kantis en ĉ. 30 roloj. Pro sia kanttalento en 1951 ŝi estis premiita per Dimitrova premio pri la rolo de Mimi en la opero "Bohemoj" de Puĉini.

Ŝia repertuaro inkluzivas la operojn "Madam Baterflaj" de Puĉini, "Traviata" de Verdi, "Eŭĝeni Onegin" de Ĉajkovski, "Vendita novedzino" de Smetana, "Reĝa fianĉino" de Nikolaj Rimski Korsakov, "Pajaco" de Leonkavalo ka.

Pro sia aktiva E-agado Rene Jordanova estis premiita de la CE de BEA per Jubilea ora medalo "Cent jarojn Esperanto".

En naciaj E-kongresoj ŝi partoprenis la belartan programon. En multe da E-arangoj en Pazarĝik, Plovdiv, Sofio, Burgas, Kazanlak, Ĉirpan, Magliĵ, Stara Zagora ŝi partoprenis la artprogramojn.

Ŝi estas aktiva ĥoranino en la Internacia E-Ĥoro kaj partoprenis la koncerton okaze de la 10-jara jubileo de la IEĤ kaj solkantis sur la scenejo en Ĉepelare.

En amika rondo, meze de familianoj en la E-kulturdomo en Stara Zagora, la solenaĵon malfermis la organizanto pri Haskovo-regiono Nejko Kunev. En la nomo de la E-societo salutis la jubileulinon Stefka Petrova, kiu koncize rakontis pri ŝia vivo. En la nomo de la bulgara parto de la IEĤ salutvortojn kaj bondezirojn prezentis Sonja Tiĥova. Speciale salutis ŝin ankaŭ s-ro Terziev kaj aliaj geesperantistoj el Stara Zagora.

Rene Jordanova ricevis donacojn kaj multe da floroj.

La E-ĥoro el Gorna Orjaĥovica sub la gvido de Enĉo Balanov kantis kelkajn E-kantojn. Ankaŭ Rene Jordanova solkantis por ni.

La etoso estis tre amika kaj sincera. Ni ĉiuj bondeziris al la jubileulino bonan sanon, longan vivon kaj kapablon bele kanti ankoraŭ multe da jaroj. Ni disiĝis kun bondeziro "Ĝis la sekva 90-jara jubileo de Rene Jordanova!"

Sonja TIĤOVA



Josif PETROV ELKRIO EL LABOREKZILEJO

*Post punlabor' la tago en ruĝo malaperas
kaj dronas fore lastaj radioj de la sun',
la miriadaj gemoj de l' altaĵo stela
vibradas de rigardo via en la lum'.*

*Sub ties ensorĉeco, en kara rememoro,
min trafas maltrankvile mispalsa kora sent',
kaj en animo kanto amata eksonoras
de vi kantata milde en trista fridmoment'.*

*Printempon trian nin faras disaj malproksimo,
tre foras, foras ni en malvigla atoni',
pri vi mi revas en izoleja hor' intima,
en patra dom' vi sola manstreĉas nun al mi.*

*Ho, kiel triste, vee formortas tie tagoj,
por ni tag' estas jaro, la jaro tutjarcent',
rekonis la abismon mi de la homaj plagoj,
de l' nuna homo min trafis la malama sent'.*

*Sed kredas firme mi je justeco granda, bona!
Ekbrilos super mi de la liberec' radi'!
Premita de turmentoj animo vin alvokas
kun brakoj en etend' per prizona atoni'.*

*Atendu min, al vi revenos mi, amata,
malliberulo trista, kun vundoj en anim',
en nia dom' vi akceptos min kun pietato,
de la turmentoj fiaj jubila venos fin'.*

El bulgara: Violin OLJANOV

Nikola PILEV

LONGAS VOJO

*La homoj vid-al vide
rigardas sin avide,
sed restas post
kurteno
pensado kaj sinteno.*

*Fermitas homa esto
samkiel nigra kesto.
La homo tiel certe
forlasas mondon
ĉerke.*

*Li ofte ne komprenas
eĉ kio lin katenas,
kaj spitas blinde dura
dum ĝermas flor'
futura.*

*La homo kreskas lante
barilojn mil rompante,
kaj estas longa vojo
percepti ies ĝojon.*

*Li marŝas daŭran
tempon
por lerni la amsenton,
kaj vojos li ankoraŭ
ĝis kor' atingos koron.*



Grafikaĵoj: Penka PETKOVA



ELIN PELIN

LA HOMO, PRI KIU ĈIUJ ZORGAS

Oni enoficigis multmembran komisionon el gravaj personoj - specialistoj, scienculoj, akademianoj, ekonomiistoj, financistoj, inĝenieroj, arĥitektoj, kemiistoj, botanikistoj, zoologiistoj, kuracistoj, higienistoj, filologoj, por ke ili renkontiĝu, kontaktiĝu, esploru, redonu, decidu.

Kion ili... decidu?

Dum la unua kunsido ili ne povis decidi kion ili devis decidi. La tasko estis malfacila. Kiel oni devas eliri el la embarasita ekonomia situacio, kaj kiel oni deyas plibonigi ĉiuflanke la vivon kaj la vivtenon de la mizerega bulgara civitano, ĉefe de la prudenta kaj laborema agrikulturisto kaj laboristo.

Tian malfacilan taskon, kompreneble, ne povas solvi registaro, kiu konsistas el ĝenerale aprobitaj, aŭ mem aprobitaj, moŝtoj sen la helpo de unu aŭ kelke da komisionoj.


Kaj jen, oni kompilis tiun decidigan komisionon, kaj edikto pri ĝi surverŝis per espero la paradizan ĝardenon "Bulgario" de la unua ĝis alia flanko.

Dum la dua kunsido la demando estis iagrade klarigita. Parolis elektitaj oratoroj, specialistoj, oni eldiris profundpensaĵojn, pompajn vortojn, kaj decidis: kiam estos la tria kunsido.

Oni decidis dum la tria kunsido, ke dum la sekvonta kunsido oni devus elekti subkomisionojn pri apartaj demandoj.

En la sekva kunsido oni decidis, ke en la sekvonta kunsido devus elekti komisionon, kiu konkretigu la apartajn demandojn. Sed la apartaj demandoj okazis tre obstinaj en sia malkompreneblo, kaj pro tio oni elektis komisionon, kiu enmetu ian klarigon, tiel do, apartigu la ĉefajn el la duarangaj.

Kaj la afero prosperis facile. Agado - granda!



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

Ĉiutage en la gazetoj longaj komunikoj anoncis al la popolo, ke ĉio estos en ordo, ke oni prenis seriozajn rimedojn kaj ke baldaŭ la komisiono havos novan kunsidon.

Ekesperis la popolo, ekĝojiĝis, ne deziris labori, nur manĝis, trinkis, amuzis sin, atendis la rezulton kaj per la telegrafo pretendis dezirojn.

Ĉion oni antaŭvidis, kolektis paperojn, amasiĝis dokumentaro, donis al la komisiono monsumojn pri lupago de ejoj, de oficistoj kaj pri aliaj similaj celoj.

Ekbolis intensa kaj streĉa agado. Jaro, du, tri, kvin, dek, dudek... Similaĵo ne estas facila afero. Oni devis kolekti statistikajn informojn, esplori apartajn demandojn, ligitajn kun apartaj demandetoj, do tiel, iom post iom oni devis alveni al la plej ĉefa afero.

Sed, okazis tiel, ke pro la longaj kunsidoj kaj pro peza trolaciĝo, la komisiono forgesis la plej ĉefan aferon.

Kolektiĝis la estimataj moŝtoj, viciĝis la saĝaj kapoj unu ĉe alia kvazaŭ brasiko en legomĝardeno kaj pensis, parolis kaj oni demandis: "Do, kio estas tiu afero?"

Forgesis la komisiono la ĉefan aferon, ja la popolo forgesis la komisionon, kaj sian ekzistadon komencis tiuj du elementoj de la popola kreado, ni diru, tute memstare.

La komisiono kunsidis, sed la sobra bulgara popolo trinkis kaj atendis, forgesinte kion ĝi atendis. Foje en la analoj de tiu supera komisiono okazis io tute neordinara.

Dum la kunsido de la sinjoroj, la pordo de la salono malfermiĝis kaj lante, kaj interne senbrue, kaj iamaniere intime, enŝoviĝis, kiel enŝoviĝas iu porkido en ian vilaĝan domon, unu stranga persono. Sur lia timema fizionomio tuj oni povis kompreni, ke li estas troviĝinta ĉi tien pro miskompreno, ĉar li paŝis iom malantaŭen, demetis timeme sian ĉapelon kaj diris:

- Pardonu!

Tiu malfavora persono havis bruniĝintan kaj nerazitan de kelke da tagoj vizaĝon, ŝvitan, nekombitan hararon, gluitan per dikaj tavoloj sur la verto, senkoloran, timeman rigardon, karnohavajn orelojn, hirtajn lipharojn, malsupran makzelon, kiu tenis lian buŝon duonmalfermitan kiel ĉe ĉiu naŭva simplulo.

Li estis vestita per malnoviĝinta vilaĝana vestaĵo, ĉi tie kaj tie flikita, kaj fetoris de io simila al ajlo, miksita kun brando kaj ŝvito. Tiu "aromo" plenigis la puran, elegantan salonon de la kunsido.

Tiu stranga persono komprenis, ke faris eraron, ekridetis kulpe kaj dorse ekiris eliri. Tamen unu granda viro el la komisiono kun ovala kaj malmola kapo, forta posedanto de saĝegaj pensoj, saltleviĝis kaj ordone ekkriis:

- Haltu!

La homo konsterniĝis pro tiu krio kaj ekstaris rigide malantaŭ la pordo.

Tiam la sinjoro el la komisiono, kiu haltigis lin, ekridetis iel neordinare kaj turniĝis verve al la kunsidantoj:

- Fin-fine, mi rememoris!... Jen la ĉefa io! Jen pro kio ni kunsidas! Jen la persono, pri kiu ni ĉiuj zorgas. Bonega ekzemplero!

En la salono eksplodis manplaŭdoj, aperis vigleco.

La malsupra makzelo de la "bonega ekzemplero" ektremis kaj ekpendis pli. Eĉ li ekridetis iel kulpe.

- Jes, unu reprezentanto de la popolo, - daŭrigis la inspirigita sinjoro, - unu reprezentanto de la popolo, pri kiu ni ĉiuj ĉi tie, kiel spirita elito de la nacio tiel multe zorgas. Jes, kaj ni ne konis lin, ni ne estis vidintaj lin, li estis ĝis nun por ni nekonata. Kaj jen, la providenco elsendas lin al ni. Ni ne devas lasi lin, ĉiuflanke kaj videble ellernu lin per ĉiuj metodoj, kiujn donas al ni la nuntempa scienco. Bonvolu la zoologistoj kvalifiki, la kemiistoj analizi, bonvolu la kuracistoj nekropsii, ĉiuj specialistoj apliki siajn metodojn, por ke ni komprenu lin, eksciu lian doloron, kaj tiam, apogante al la scienco, helpu lin efike.

- Ni konsentas! - ekkriis ĉiuj unuanime.

La prezidanto premis la sonorilon. Eniris la servisto.

- Konduku lin por esplorado! - montris la prezidanto la "bonegan ekzempleron".
La kunsido prokrastiĝis okaze de la feriado.

...Post du monatoj, la komisiono, refreŝigita dum la somera libertempo, denove kolektiĝis.

- Ni devas komenci la analizon de la persono, pri kiu ĉiuj ni zorgas, - estis la unuaj vortoj de la prezidanto, ordonante al la servisto venigi lin.

- Ja li mortis! - diris la servisto.

- Kiel do mortis? - demandis la prezidanto.

- Tiel, ni forgesis... nutri lin.

La kunsidantoj prokrastis sian agadon por la sekva fojo.

Esperantigis: Miŝo ZDRAVEV

GASTON WARINGHIEN - 90-JARA

LA MULTFACETA WARINGHIEN

Prof. Gaston Waringhien, la fama E-leksikologo, originala poeto kaj literatura eseisto, tradukisto kaj esperantologo, naskiĝis en Lille (Nord-Francio) la 29-an de julio 1901. Lia patro estis instruisto, i.a. pri la germana lingvo.

Deksesjara, li estis varbita al Esperanto de la helpkasisto de la 1-a Kongreso en Bulonjo, Gaston Lephay.

Baldaŭ poste komenciĝas la eksterordinara kariero de Gaston Waringhien: 19-jara, jam licenciato pri literaturo; 20-jara, ricevis diplomon pri historio de la religioj; 22-jara (jes!), agregaciulo pri lingvistiko; 24-jara, membro de la "Lingva Komitato" de Esperanto.

Profesie, li estas en tiu tempo profesoro pri latina, greka kaj franca lingvoj en la Liceo de Lille.

Intertempe (1934) li fondas "Franca Esperanto-Instituto", kiun li prezidas ĝis 1963; kaj en 1937 estas elektita membro de la Akademio de la Lingva Komitato (tiutempa titolo).

En 1939 lia profesia kariero kondukas lin al la Liceo de Tours. Sed tuj li estas mobilizita kiel Divizia Stab-oficiro pri la Cifro-Sekcio.

La 27-an de junio 1940 li troviĝas inter la militkaptitoj ĉe la Donon-Monto (Alzaco).

La 9.9.1942 li estas kondamnita de la germana instanco pro "kaŝaŭskultado de la anglaj radio-dissendoj", kaj sendita al la "Sonderlager" de Lubeck. La 2-an de majo 1945 britaj trupoj okupas Lubeck-on kaj tri semajnojn poste li estas demobilizita en Tours.

Venas nun pli trankvilaj epizodoj:

1947 - Profesoro en la Tours-landa Universitato.

1949 - Profesoro en la grava liceo Lakanal en Parizo.

1950 - Promociita rezervkapi-

tano en la ĉifra stabsekcio.

1951 - Li estas Direktoro de la Akademia Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro.

Waringhien estas kunfondinto kun R. Fiquet de la nica literatura revuo (1955), kiun li redaktos ĝis 1962.

Dume li estis profesoro ĉe la "Brita Instituto" en Parizo.

Fine, post grava okul-operacio, li emeritiĝis kiel Honorprofesoro (1962).

De 1963 ĝis 1979 li estis la de ĉiuj rekonata prezidanto de la Akademio de Esperanto.

Gaston Waringhien estas fama leksikologo, originala poeto, tradukisto kaj unua originala eseisto. Liaj eseoj dividiĝas en tri ĉefajn partojn: religiaj-artaj, beletraj kaj esperantologiaj. Ĝis nun aperis kvar eseaj volumoj: "Beletro" (1956), "Lingvo kaj vivo" (1959), "Ni kaj Ĝi" (1972) kaj "1987 kaj la sekvo..." (1980).

Lia leksikologia ĉefverko estas Plena Ilustrita Vortaro (1970) kaj de "Suplemento" (1987) al ĝi. Krome li estas kunlaboranto en Plena Vortaro de Esperanto (1930), redaktoro de la grava "Suplemento" al Plena Vortaro (1954) kaj kompilinto de Granda Vortaro Esperanto-Franca (1957). Waringhien estas kunaŭtoro de "Plena Gramatiko" (1935, kun K. Kalocsay), kies kvara tralaborita eldono aperis sub titolo "Plena Analiza Gramatiko" (1980).

Krome li estas ankaŭ kunaŭtoro de "Parnasa Gvidlibro" (1932, kun K. Kalocsay, dua eldono - 1968, ankaŭ kun la helpo de R. Bernard).

Pluraj volumoj el la franca poezio kaj de aliaj naciaj poezioj atestas pri lia tradukmajstreco. Kiel originala poeto li famiĝis ĉefe sub la pseŭdonimo Georgo E. Maŭra ("Duonvoĉe", 1939, 1963). Waringhien kunlaboris



kun K. Kalocsay por krei pseŭdonime la erotikan poemaron "Libro de amo" (1969, fakte 1965).

Gaston Waringhien partoprenis de 1928 en 24 Universalaj Kongresoj de UEA kaj en 9 Kongresoj de SAT. Li estas vidvo; li havis tri infanojn, el kiuj unu plu vivas.

LA KISO

Kio estis kaj fariĝis la kiso, antaŭ ol naski unu literaturan ĝenron, estus interesa historio por rakonti. Oni devus komence menci la praajn konceptojn de la homoj pri la idento de la spiro kaj de la viv-principo, kaj klarigi la unuan signifon de tiu gesto, per kiu la kiso simbolas donis sian animon al la kiso. Ĉar la kiso estis en tiu tempo signo de religia adoro, ne de laika amo: oni kisis la statuojn de la dioj ("*sepmil, kies genuoj ne fleksigis antaŭ Baal kaj kies buŝo ne kisis lin*" I Reĝ. XIX 18) aŭ almenaŭ oni ŝajnis tiun agon de sindonado per movo de la fingroj de sur la buŝo en la direkto de la adorato - ("*Kiam mi vidis la Lunon majeste irantan, ĉu tiam sekrete forlogiĝis mia koro kaj mi sendis kisojn per mia mano?*" - Ijob XXXI 26).

Poste la kiso, flate uzata kontraŭ altrangaj personoj, fariĝis rito de respekto plena ĝentilo: oni kisis la buŝon de sia mastro, de sia superulo: tial Judas donas al la insidantoj pro signo de rekono tiun kison, per kiu li, same kiel la aliaj disĉiploj, kutime salutis sian rabenon, Jesuo. Reston de tiu ĝentila rito oni trovas en la mezepoka ceremonio, en kiu la vasalo metis siajn lipojn sur la lipojn de sia feŭdestro en la momento de la omaĝo. (Ankoraŭ dum la cara reĝimo, la servistoj tiamaniere dankis esceptan favoron de sia mastro.) Poste, la kiso ankoraŭ pli senvalorigis kaj ĝi fariĝis simple la ordinara salutmaniero de la viroj al la virinoj, la reĝinojn kisi sur la buŝo havis tiutempe la katolikaj kardinaloj ekskluzivan rajton. Kontraŭ tiu modo jam protestis Montaigne: "Tio estas malplaĉa moro kaj insulta por la damoj, ke ili devas pruntedoni siajn lipojn al kiu ajn havas eskorte tri lakeojn, kiel ajn antipatia tiu estas..." (Eseoj III 5).

Sed la kontakto de du buŝoj povas ankaŭ signifi la interŝanĝon de la du spiroj, do konsistigi ian riton de interpaciĝo kaj amikiĝo. La oficialaj kontraktoj en la antikva tempo estis ofte konfirmitaj per tia kiso. Kaj tia estas la signifo de tiu gesto, en la biblia sceno, kie Joab, unu el la militestroj de David, malembarasas sin je sia rivalo: "*Kaj Joab diris al Amasa: Kiel vi fartas, mia frato? Kaj per la dekstra mano Joab prenis la barbon de Amasa, por kisi lin. Amasa ne atentis la glavon, kiu estis en la mano de Joab kaj ĉi tiu frapis lin per ĝi en la ventron*" (II Sam. XX 9-10).*

Tiu "frata" aŭ "paca" alpremo de buŝo al buŝo estis unu el la karakterizaj ritoj de la primitivaj kristanoj: en siaj "agapo" (t.e. ama festeno) la "fratoj" kaj "fratinoj" interŝanĝis kisojn. "Salutu unu la alian per sankta kiso", admonas ilin Paŭlo en la fino de siaj leteroj. Tiu moro daŭris kelke kvar jarcentojn, kaj fine estis abolita, probable pro la tro naturaj sekvoj. Sed en la 18-a jarcento la angla sekto de la pietistoj renovigis la antikvan riton, kaj ili zorge kisis unu la alian, sur la buŝo, elirante el la kunveno. Mi ne scias, ĉu la maloportuno, kiuj kaŭzis la unuan ĉesigon de la "paca kiso" ĉe la malnovaj kristanoj, ankaŭ montriĝis ĉe la novaj. Eble la malvarmo de la klimato sufiĉis por malardigi kaj senvenenigi tiun karesan geston...

Efektive la delikata histo de la lipoj, ĝiaj subtilaj papiloj, ĝiaj multaj muskoletoj kaj ties lertaj streĉoj kaj malstreĉoj facile naskas raran kaj plezurigan senton, kiam kuniĝas la lipoj de du ne tro maljunaj personoj. La rita aŭ ĝentila gesto do per natura glito transformiĝas al kareso. Sed estas atentinda afero, ke tian kareson uzadas ne ĉiuj popoloj, kaj ke ĝi restis longatempe nekonata eĉ de la voluptamaj aziaj gentoj.** En la *Iliado*, Hektoro, adiaŭante sian fileton kaj edzinon, ne kisas ilin: li nur flatas per la mano la amatajn kapojn. En la *Odiseado*, Odiseo kisas nek Kalipson, kiam li ŝin forlasas, nek Penelopejan, kiam li ŝin retrovas. En la Biblio same la ama kiso estas fremda ne nur al la poligamaj patriarkoj, sed ĝi mankas eĉ al la plej famaj amrakontoj: David ne kisas Bat-Ŝeban, nek Salomono la reĝinon de Ŝeba; oni devas atendi ĝis la popolaj edziĝkantoj, kunigitaj ĉirkaŭ la 3-a jarcento a. K. en la *Alta Kanto*, por ekaŭdi la famegan, ardan sopiron:

Li kisu min per kisoj de sia buŝo

Ĉar via amo estas pli bona ol vino... (I 2)

Cetere la unuaj literaturaj esprimoj de tiu nova ammaniero konservas multe el la primitiva kredo pri ĉeesto de la animoj en tiu spirkuniĝo; ekzempla estas jena epigrama, kiun la tradicio atribuas al Platono:

Dum Agatonon mi kisis, l'anim' al mi venis surlipe:

ho povruleta! ĉu do volis vi pasi en lin?

Antologio Palatina V 78; ĉ. IV-a jarc. a.K.

La romanoj akceptis de la helenoj kaj la kareson kaj ĝian poezian elvokon: oni konas la belan poemeton de Katulo, tradukitan de Kalocsay en Eterna Bukedo:

Vi, Lesbia, demandas, kiom kisoj

mia koro bezonus por satiĝi?...

Sed oni eble ne scias, ke, kun sia ekzaktema menso, la romulidoj klasifikis la kisojn kaj elpensis diversajn vortojn por ĉiu speco: tion instruas al ni Seruius, komentante la *Eneidon* (I v. 256): "*Oni devas scii, ke la osculum rilatas al la religio, la sauium al la plezuro, kvankam kelkaj asertas, ke oni donas osculum al siaj filoj, basium al sia edzino kaj sauium al prostituitino*".

Malgraŭ tiu delikata distingo, la kiso restis ankoraŭ en la literaturo io malgrava, akcesora, al kio oni

ne dediĉas tutajn poemojn: ĝi estis rigardata kiel spico de la amfesteno, kaj ne kiel la ĉefa manĝaĵo. Tio tamen ŝanĝiĝis, kaj la genio, al kiu la kiso ŝuldas tiun literaturan - kaj socian - promocion, estis unu latinlingva poeto de la 16-a jarcento, Johano Everaerts, alnomata *Secundus* ("Dua") oni ne scias kial (li estis la sepa aŭ la oka inter la 18 gefiloj). Li ne ĝuas nun tre grandan famon, kaj nur iom esceptaj kondiĉoj konigis lin al mi.

Estis en decembro 1939. Mi estis mobilizita en teritoria regimento sur la nordfranca landlimo, en Saint-Amand apud Valenciennes; tie mi diligente muldis betonon kaj, en mia perdita tempo, elfosis sulkegojn tra la kampoj, la ĝardenoj kaj kelkfoje tra la domoj mem de tiu ĉarma, kvankam iom ebena, terparto. En unu el tiuj fosadoj, ni eltrovis kelkajn marmorajn rubaĵojn, evidente pecojn de malnova, latine surskribita tomoŝtono. Enketante pri la ebla origino, mi tiam eksciis, ke ili verŝajne devenis de la iama abateja preĝejo de Saint-Amand, kiu estis forvendita kaj detruita en 1798. Kaj la loka erudito, tute ĝoja, ke li trovis komplezeman orelon, detalis al mi ĉiujn glorajojn de tiu iama katedralo, inter kiuj li citis la tombon, kie Johano Sekundo ĝuis tro fruan ripozon post mallonga, sed agita vivo. Nenion vere mi sciis pri tiu malfeliĉa fremdulo, kiu venis tiel morti en nia valona urbeto, sed mian nescion mi ne konfesis: ŝirminda estis la prestiĝo de miaj leŭtenantaj galonoj! Tial, dum mia unua forpermeso, mi pruntis de la urba biblioteko en Tours la verkojn de la poeto, kaj el liaj melan-
koliaj elegioj mi informiĝis pri liaj aventuroj...

Johano Sekundo estis naskita en Hago, la 14-an de novembro 1511. Je la aĝo de 20 jaroj, li venis Francion, en Bourges, studi juron sub la fama Andreo Alciat; sed ne la juro sola okupis lian spiri-
ton. Inter liaj kunuloj li amikiĝis kun Salmono Makrino, juna poeto el Poitiers, kaj iliajn poeziajn pro-
vojn favoris ilia majstro mem, Alciato, kiu ne malŝatis la latinajn muzojn. Lerninte tiamaniere kaj sam-
tempe la leĝojn kaj la versojn, Sekundo revenis Mehlinen la 13-an de marto 1533, kun la titolo de
doktoro pri juro kaj la ambicio fariĝi granda latina poeto. Tuj post sia alveno, li enamiĝis al la filino
de riĉa burĝo, Julia, unu brunulino kun freŝaj lipoj kaj oraj okuloj. Li prikantis ŝin en belaj elegioj,
el kiuj ni ekscias, ke la juna flandrino ne estis al li tro sovaĝa:

*Lipojn koralajn, je l'mor' de kolomboj, kunigu al miaj,
tuj! kaj en sia ofic' pigru nek lango nek dent'!*

Sed io estas la flirto, alio la edziĝo: Julia preferis, kiel vivkunulon, solidan burĝon proponitan de
ŝia patro, kaj probable pli monhavan, ol nia Sekundo...

Por mildigi lian doloron kaj ŝanĝi al li la ideojn, lia frato, Nikolao Grudio, instalita en Hispanio,
petis lin eskorti lian edzinon, Anna Kobella, kiu estis tuj veturonta al Madrido. Tiel, komence de
1534, la juna nederlandano, kune kun sia bela kaj juna bofratino, forlasis la grizajn tagojn kaj mal-
dolĉajn memorojn de Flandrio por la hispanaj flamoj kaj pasioj.

En tiu nova lando, li rapide sin konigis kaj ŝatigis: la apogo de lia frato probable ankaŭ utilis al li,
ĉar jam du monatojn post lia alveno, la ĉefepiskopo en Toledo, Johano Tavera, prenis lin al si kiel
sekretarion. Oni ne ŝcias, ĉu estis en la kortego de la ĉefepiskopo aŭ en alia monduma kunveno, kie
li renkontis la junan hispaninon, kiun li famigis sub la nomo Neera, kaj al kiu li tute sin fordonis.
Sed eĉ en la elekto de la amatino ni divenas la fantazion de la poeto: tie, inter la helharaj flandrinoj,
li estis aminta la brunan Julian; ĉi tie, meze de la ebone nigraj plektaĵoj kaj orbrunaj vizaĝoj de la
sudaninoj, li havis rigardojn nur por unu blonda kapo kaj lakteca haŭto. Cetere, ne plu al honesta
burĝidino li direktis ĉi-foje siajn dezirojn: Neera estis unu el tiuj hetajroj, kiuj, en tiu duonpagana
tempo, ornamis per sia belo, eleganto kaj sprito la ekleziajn palacojn en Romo aŭ Madrido, solaj
lokoj, kie ne povis rivali kun ili iliaj naturaj malamikinoj, la leĝaj edzinoj. Sekundo, elektante tian am-
objekton, probable flatis al si, ke ŝi estos pli fleksebla al liaj deziroj, ol la virtama mehlinanino.
Bedaŭrinde, la romantismo ankoraŭ ne entreprenis sian krucmiliton por la remoraligo de la prosti-
tuitinoj, kaj Neera, kiel ajn klera ŝi estis, ne povis legi la kortuŝajn admonojn de Aleksandro Dumas
la filo, nek de grafo Tolstoj. Tiel kaprica, kiel mokema, Neera nenion komprenis pri la poeziaj rafi-
naĵoj - kaj aŭdi Sekundon nomi ŝin ĉasta, pura kaj virta ŝajnis al ŝi tiel amuze, ke ŝi decidis meriti
efektive tiujn laŭdojn - sed nur rilate al ŝia poeto. La malfeliĉulo efektive plendas en siaj versoj, ke,
por ne supozigi lin mensoga, la kruela forĵetis, kun hontoplena vizaĝo, ĉiujn liajn ampetojn, dum al
aliaj amantoj ŝi larĝe malfermis sian pordon, el kiu pli ol unu eliris, laca kaj satigita... Tamen ŝi ne
volis tute malesperigi tiun, kiu alportis al ŝi almenaŭ iom da gloro, kaj, rekompence por liaj sciople-
naj laŭdoj, ŝi forcedis al li sian buŝon kaj invitis lin poste rakonti, kiel

*... horon post hor' vi senfine sur miaj modulis
lipojn humidajn je ros' en kolombuma kisd'!*

Post unu tia ekscita kaj laciga vizito, Sekundo verkis longan, kortuŝan elegion, datitan *Toleti, mense
Aprili 1534* (Toledo, en Aprilo 1534), en kiu, pentrinte ĉiujn ruzojn de Neera por rifuzi al li sian
kuŝejon, kaj plendinte sian sorton, li fine ekkrias, kvazaŭ proteste kontraŭ tia nekompleta, artifika
amado:

*Plaĉas al mi la lud' kaj la rido kaj migra loĝejo,
plaĉas la liro al mi, kaj ĉe la vino la roz',
ia tagmezo sen nub' kaj ia mallumo sen nokto,
kaj sen mallum' ia nokt', kaj sen aĉet' ia lit',
ia batal' sen malam' kaj ia milito sen vundoj,
kaj je la frua maten' dorme venkita Venus'!*

(II 8)

Plezuro, kiun li neniam devis koni ĉe Neera. Almenaŭ tiujn tagajn horojn de volupto, lian solan riĉon, kiuj hantis lian memoron, li volis eternigi per la poezio. Kaj tiel naskiĝis tiu fama libro, girdando de 19 perfektaj *Kisoj*, en kiuj li diras sian tutan pasion kaj sian tutan doloron per la lingvo de Katalo kaj Tibulo:

*lafoje teneraj viaj brakoj
min premegas, kaj via tuta korpo,
kolo, brusto, vizaĝo glatkaresa,
pendas ĉarme de miaj ŝultroj; tiam
vi kunigas al miaj lipoj viajn,
min ekmordas kaj ĝemas remordate,
vian langon vibrigas en tremado
kaj la mian plendantan vi suĉadas,
enspirante en min balzaman blovon,
harmonian, humidan, mildan - nutron
ho Neera, de mia viv' mizeral -
aŭ ĉerpante kadukan mian spiron,
kies brulo el troa ard' naskiĝis
en bolanta, freneza mia brusto...
Sed ĉi flamon, Neera, vi vanigas
per la blovo de brusto ardenspira:
ho agrabla ventet' al mia febro!
Kaj mi diras: "Amoro, Di' de l'Dioj!
lin superas nenio Dio; tamen
se Amoron superi devus iu,
vi, vi sola, Neera, lin superus!"
(Kiso V)*

Apenaŭ publikigitaj, en 1539 - tri jarojn post la malesperige frua morto de tiu dudekkvinjara artisto - la *Kisoj* atingis tian famon, ke ilin oni legis kaj laŭdis en ĉiuj eŭropaj landoj. Kaj ne nur facilanimaj junuloj nutris per ili sian fantazion: Montaigne deklaras, en siaj *Eseoj*, ke ili meritas, ke oni distru sin per ili, kaj, ankoraŭ unu jarcenton poste, ili kuŝis en la biblioteko de la grava Spinoza. Sed ne al tio limiĝis la gloro de Johano Sekundo: tre baldaŭ la renesancaj poetoj, ĉiu en sia lingvo, ambiciis traduki aŭ imiti tiujn ĉefverkojn, jam tiel klasikajn, kiel la odetoj de Anakreono. Senutile estus elnombri ĉi tie ĉiujn, kiuj en la modernaj lingvoj kantigis la ardojn de la hagano: Ronsard en la franca aŭ Guarini en la itala ktp. Mi mencias nur du pli malfruajn imitaĵojn, kuriozajn pro la nomo de ilia aŭtoro, kaj kiuj pruvos, ke la ĝenro daŭre prosperis post la 16-a jarcento. La unuan verkis Voltaire, en iom arkaika stilo:

*Se kisojn mil kaj mil, en arda amesprimo,
sur belan gorĝon aŭ fingreton vi deponos,
nur vanel! Tiuj ĉi ne unu eĉ redonos.
Kisu la buŝon, ĝi respondos al l'animo.
Gluiĝas la anim' al lipoj el ĉerizo,
al dentoj el ebur', al langeto movriĉa;
l'animo ĉe l'anim' sin sentas plej feliĉa:
du estas unu nur - jen vera paradizo.*

La duan verkis Carducci:

*Ulmon kun lia verda in'
mi vidis en mallarĝa brakum' prosperi kune;
al la ileks' jarplena sin
vindi mi vidis florajn korimbojn graciajn:
ha, se per viaj rozaj brakoj,
blanka Neera, same vi tiel min katenusl...*

Sed kial citi plu? Pli ol unu amanto, en sia koro, portas gravuritajn tiajn versojn - kiu neniam suspektis, ke ili havas, kiel malproksiman fonton, la doloron iam, en nobla brusto, ekbruligita de la perversaj kapricoj de hispana knabino...

Gaston WARINGHIEN

Notoj:

* Kiel oni vidas, la kiso ne unu fojon utiliĝis por perfido. Tiukaze rimarkis Voltaire: "Neniun kison oni trovas en la aliaj murdoj, iom ofte okazintaj ĉe la Judoj, krom eble la kisoj, kiujn Judit donis al kapitano Holoferno, antaŭ ol detranĉi al li la kapon en la lito, post lia endormiĝo: sed tiujn oni ne mencias kaj la afero estas nur verŝajna. - En unu tragedio de Shakespeare, nomata *Otelo*, tiu Otelo, kiu estas negro, donas du kisojn al sia edzino, antaŭ ol sufoki ŝin. Tio aspektas kiel abomenindaĵo al la civilizitaj homoj; sed amatoroj de Shakespeare asertas, ke ĝi estas la bela naturo, precipe ĉe negro..."

** La egipta vorto responda al nia "kiso" signifas laŭlitere "nazparfumo", kaj estas skribita, en

ESPERANTAJ FAJREROJ

Esperanto estas lingvo, ideo kaj samtempe rimedo por helpi al homoj fali en plagon kaj malesperon. Genia estis Zamenhof ne nur ekkrei la lingvon, sed ankaŭ nomi ĝin per la vorto "esperanto". Probable, nome la kredo kaj la espero pri io pli bona instigis multajn homojn okupiĝi pri Esperanto. Kaj la fortostreĉojn bezonatajn por la ellernado de tiu ĉi lingvo multoble rekompencas la bonaĵoj, kiujn ĝi havigas al la homoj.

Tiel okazis en mia vivo, ke mi longe estis malproksime de mia patrolando, por studcele. Post kiam mi renenis, mi trovis malmultajn de miaj malnovaj geamikoj. Kun la amikoj el la studado mi nur korespondis, ĉar ili estis disirintaj tra la mondo. La plimulto el miaj ofickolegoj havis siajn familiojn kaj post laboro ili rapidis reveni hejmen. Mi sentis min soleca kaj konfuzita. Miaj profesiaj intereso, lernado de angla lingvo, legado de belarta literaturo, vizitado al spektakloj kaj koncertoj ne povis satplenigi la grotojn en mia animo.

Tamen foje iu mia amikino aludis, ke ŝi okupiĝas pri Esperanto kaj estas tre kontenta pro tio. Ŝi rekomendis, ke mi same okupiĝu pri ĝi. Mi tuj deklaris, ke mi ne emas aliĝi ilian sekton. (Poste mi multfoje bedaŭris pro tiuj miaj vortoj.) Eble ŝi ne estis sufiĉe elokventa. Aŭ eble la kialo de mia skeptikeco rilate Esperanton kaŝiĝis en mia malnova travivaĵo, kiu lasis malagrablan senton en mi.

Tio okazis antaŭ jaroj en Varna. Tiam mi estis ankoraŭ infano kaj multajn aĵojn ne komprenis. Kun iu amikino ni eniris librovendejon serĉante legaĵon. Apud ni staris oldaj viro kaj virino, kiuj havis tre sulkiĝintajn vizaĝojn. Ili parolis iun nekonatan lingvon. Ĉu ni infanece ekĝapis ilin aŭ io ajn igis ilin, mi ne memoras, sed la virino subite turnis sin al ni en bulgara lingvo, ekridetis kaj diris: "Ni parolas Esperanton. Jen, vi vidas, la sinjoro estas eksterlandano kaj ne konas la bulgaran. Mi ja ne parolas lian lingvon, sed ni ĉarme interkompreniĝas Esperante". Ĝis tiam ĉio estis bona kaj ni kun intereso aŭskultis, kvankam interne ni pensis kiom multe ŝi similas al Avino Jaga. Tamen en la sekva momento la virino komencis konvinki nin, ke ni same devus esti esperantistoj. Mi jam ne memoras ĝuste kiujn vortojn ŝi uzis, sed mi bone memoras, ke ni forte terurigiĝis. Sentante nin kiel en kaptejo, ni nur atendis konvenan momenton por eliri el la librovendejo. Ekstere ni ambaŭ konstatis, ke la esperantistoj estas tre danĝeraj homoj kaj por nenio en la tuta mondo ni ligiĝos al ili.

Kompreneble tio estis nur infana memorajo. Sed kion fari, se poste neniu iam diris al mi ion ajn pri Esperanto - nek bonan, nek malbonan. Kaj jen vi vidu nun, unu el miaj plej proksimaj amikinoj estas esperantistino! Eĉ io plia! Tiu mia amikino invitis min festi la Novan Jaron en la rodopa vilaĝo Pisanica. Ŝi klarigis, ke tie troviĝas Internacia Esperanto-Kursejo kaj la ĉirkaŭa naturo estas belegra kaj ke oni invitis ankaŭ eksterlandanojn. Sciante mian opinion pri esperantaĵoj kaj esperantistoj ŝi aldonis, ke se mi ne volas komunikiĝi kun la esperantistoj, mi povas promenadi kaj ripozi. Bedaŭrinde (sed kiel okazis poste - bonŝance) mi ne havis pli allogan ideon pri Novjara festo kaj akceptis la proponon.

Do, ni ekveturis al Pisanica. Tie ni estis restintaj kvar tagojn. Mi estis decidinta la unuajn du diurnojn satdormi, ĉar mi sentis min tre laca. Nenia dormado estis! Ankoraŭ dum la unua vespero mi estis sorĉita.

En la manĝejo kunvenis ĉirkaŭ dudek personoj, kiuj (kiel oni klarigis al mi) havis diversajn profesiojn kaj devenis el diversaj landoj. Antaŭe ili ne konis unu la alian. Tamen mi vidis, ke ili plej amike babilas, ridas, kantas kantojn, kiujn, mirakle kial, ĉiuj konis. Kaj entute ili fartis mirinde. Same kun mi ili kondukis senĝene kaj amike. Iompostioe ankaŭ mi estis infektita de ilia bona humoro. Baldaŭ mi komencis foliumadi vortareton kaj serĉi diversajn vortojn por percepti ion de ties vigla babilado. Helpe de mia amikino de tempo al tempo mi eĉ partoprenis la konversacion.

La bona humoro ne lasis nin eĉ pormomente dum nia restado en Pisanica. Tage ni kune promenadis kaj paroladis. Vespere ni bruligis fajron en la bela kameno de manĝejo, sidis apud ĝi kaj deklamis versojn aŭ kantis kaj dancis. Mi eksentis, ke tiu ĉi fajro estas magia, ĉar ĝi varmigis ne nur mian korpon, sed ankaŭ la animon. Unue ĝi forbruligis mian infanan malbonan memoradon. Poste flameto de la fajro ŝteliris en mian koron kaj provis ekbruli - en la komenco heziteme kaj post tio ĉiel pli kaj pli certe kaj forte.

La kvar bonaj tagoj finiĝis. Ekveturante hejmen mi adiaŭis ĉiujn kaj ĉion. Sed nur ne kun la flameto! Al neniu mi diris pri ĝi. Mi simple alportis ĝin hejmen. Nun mi tre zorgas pri ĝi, ĉar mi scias: se la flameto brulas feliĉe, ankaŭ mi estas feliĉa.

ĜOESTA

SPEKTAKLO EN SEULO

La Ŝtata Pupteatro - Vraca, kiu partoprenis la Internacian Pupteatran Festivalon en Seulo, prezentis spektaklon por la koreaj esperantistoj en la halo de Biblioteko "Nam San". Ĉeestis pli ol 200 geseamideanoj, kiuj aplaudis la bulgarajn aktorojn. La spektaklo konsistis el tri partoj: "Karnavalo de bestoj", "La hundeto, kiu ne povis boji" kaj demonstro de gantpupoj.

La intereso al la Ŝtata Pupteatro - Vraca venas de la sukceso dum la pasintjara Pupteatra Internacia Festivalo en Zagrebo, kie la spektaklo en Esperanto "La hundeto, kiu ne povis boji" ricevis la Grandan lingvan premion, la Premion de la faka ĵurio por plej humana mesaĝo al la publiko kaj la Premion por aktoro, plej bone konanta Esperanton.

La spektaklo de la pupistoj el Vraca en Seulo propagandis la 49an Internacian Junularan Kongreson, okazontan post du jaroj en Bulgario.

Ljubomir Trtifiĉovski

SPIRITA RESANIĜADO

(Informilo en Esperanto havebla)

La Bruno Groning-amikaro krom en diversaj eŭropaj lingvoj nun eldonis informilon ankaŭ en Esperanto. La Bruno Groning-amikaro disvastigas la saniĝodoktrinon de Bruno Groning (1906-1959). La sukcesoj ankaŭ ĉe nekuraceblaj malsanoj estas konfirmataj fare de kuracistoj. La informilo estas havebla ĉe **Detlef Meier, Marktplatz 8, D-W-6050 Offenbach, Germanio.**

INFLUO DE LA SLAVAJ LINGVOJ SUR ESPERANTO

(Daŭras de n-ro 11/91)

AFIKSOSISTEMO. La afiksoj en Esperanto ludas gravan rolon, ĉar ili permesas konstrui derivitajn vortojn el bazaj morfemoj tiel facile, kiel oni konstruas simplajn sintaksajn vortkunmetojn el vortoj. La grado de internacieco de la afiksoj estas konsiderinde malpli alta ol la internacieco de la radikoj kaj la bazvortoj. Sendepende de sia origino la E-afiksoj estas memstaraj, ĉar ili posedas aktivan produktelecon kaj formas amason da vortoj, kiuj ne estas analogoj kun la sama afikso en la lingvofonto de la afikso. Ni trarigardu iujn afiksojn, kies sola aŭ baza fonto estas la slavaj lingvoj:

Prefikso PRA-:

praavo - прагег - прагяго

pranepo - правнук - правнук

pralingvo - праязык - праязук

prapatrujo - праотечество - прапогуна

Sufikso -EJ-: estas kreita laŭ la modelo de rusaj vortoj "конгумерская", "швейцарская" kaj ankaŭ surbaze de la germana sufikso -ei-:

Backerei - panbakejo.

Sufikso -IL-: laŭ la esperantologo C. Murgin estas pruntita rekte de la slava sufikso -ил-. Li proponas liston el pli ol 60 bulgaraj vortoj, pruvante per tio la vastan funkciadon de la sufikso en la bulgara. Li eĉ emfazas, ke krom malmultaj esceptoj la -il-silabo estas akcentita kiel en Esperanto kaj preskaŭ en 70 % de la okazoj la finaĵo de tiuj vortoj en la bulgara estas -o, same kiel en Esperanto. Inter ili estas:

kagulo - incensilo

кормуло - stirilo

меруло - mezurilo

носуло - portilo

цегуло - filtrilo

оструло - pintigilo

бесуло - pendumilo

ветруло - ventumilo

червulo - ruĝigilo

чернуло - nigrigilo

светуло - lumigilo

хвърчуло - kajto

мочуло - akrigilo

возуло - transportilo

kaj multaj aliaj.

Sufiksoj -ĈJ- kaj -NJ-: en bulgara: Иванчо, Стоянчо, Генчо, Пенчо; en rusa: Саша, Гриша, Миша kaj tiel plu; Маня, Таня, Аня kaj multaj aliaj. Tiuj ĉi du sufiksoj estas la nuraj, kiuj rompas la aglutinecon de Esperanto, ĉar ilin kutime oni metas al neplena radikoj. Estas kurioze rimarki, ke por la hind-eŭropaj lingvoj, en tiu grupo ankaŭ por la slavaj, estas karakteriza la senreguleco de formado de la karesnomoj.

Ankaŭ ĉe la tiel nomataj internaciaj afiksoj estas multaj analogoj en la slavaj lingvoj, speciale en la bulgara kaj la rusa:

Sufikso -AN-: urbano - граждинин/горожанин, kristano - християнин, amerikano - американаец ktp.

Sufikso -AR-: vortaro - словарь, arbustaro - кустарник k.a.

Sufikso -IN-: diino - богиня, prinĉino - княгиня, grekino - гъркуня, turkino - туркуня ka.

Sufikso -AD-: blokado - блокада, sieĝado - обсада, embuskado - засада k.a. Tiu sufikso estas analogo de la slavaj sufiksoj -ание, -ение, -ане, -ене: atendado - очакване/ожугануе, movado - движение, kantado - пеене/пение. Tiu ĉi neslava elemento estas subtenata de la sistemo de la slavaj lingvoj. La slavlingvaj esperantistoj, en tiu nombro ankaŭ Zamenhof mem kaj la unuaj aŭtoroj de la E-literaturo, en kies konscio la verbo ĉiam devas havi aspekton, misuzis la sufikson -ad-, penante nepre doni al la Esperanta verbo formalan signon de imperfekto. La statistiko montras, ke laŭ ofteco de uzado tiu ĉi sufikso ĉe Zamenhof staras unu-loke. La nuna statistiko ĉe esperantistoj, inter kiuj ne estas slavoj, montras, ke tiu ĉi sufikso jam okupas kvinan lokon post la afiksoj: PRA-, -EJ-, -IL- kaj -UJ-.

Sufikso -UL-: ĝi estas uzata en iuj formoj en la rusa: kapriculo - капризуля, malpurulo - грязнуля ka. Tiu ĉi sufikso havas italan originon, sed en Esperanton estas enkondukita verŝajne ne sen la influo de la rusa lingvo.

Sufikso -AĈ-: verŝajne ĝi estas pruntita de iuj slavaj vortoj, kiuj havas finaĵon kun malŝata signifo, plejparte de la rusa: ловкач - lertulaĉo, рифмач - rimulaĉo, кляча - ĉevalaĉo ka.

Sufikso -EC-: tiu sufikso estas tre verŝajne pruntita de la slava sufikso -ец аŭ -оц kun la sama semantiko: свежест - freŝeco, проходимость - trairebleco, прелесть - beleco, человечность - homeco ktp.

Sufikso -EG-: estas supozo, ke ĝi sin apogas al la slava sufikso -яг- en la vortoj: хумяга - ruzegulo, штормяга - ŝtormego, бедняга - malriĉegulo ka.

Ĉio ĝis nun dirita pravas, ke granda parto de la Esperantaj afiksoj genetike kaj tipologie estasigitaj senpere kun la bazaj afiksoj en la slavaj lingvoj. Tio manifestiĝas kiel en la formo, tiel ankaŭ en la semantiko. La ĉefa konkludo estas, ke la disbranĉiĝo de la Esperanta afikso-sistemo estas tre proksima al la afikso-sistemoj de la slavaj lingvoj, dank' al kio ofte estas ebla pomorfema traduko de multaj bulgaraj, rusaj aŭ aliaj slavlingvaj derivitaj vortoj en Esperanton.

VORTFARADO. En la E-vortfarado oni povas apartigi du grupojn. En la unua eniras vortoj derivitaj per metodo, kiam al la radikoj oni metas prepoziciojn en la rolo de prefiksoj (tiel nomataj duonprefiksoj). En la dua grupo estas la derivitaj vortoj per afiksoj.

Oni devas rimarki, ke la duonprefikso ofte ŝanĝas la semantikon de la Esperanta prepozicio sub la influo de flankaj signifoj de la prefiksoj

kaj duonprefiksoj en la slavaj lingvoj. Rezulte de tio la semantiko de la derivaĵoj en Esperanto ne plu estas sumo de la signifoj de ĝiaj elementoj kaj ricevas idiomecon, kopiante la idiomecon de la konformaj vortoj en la slavaj lingvoj. Iuj modeloj eĉ transformas la verbojn de imperfekto en verbojn de perfekto, influas al la transitiveco de la verboj kaj iufoje postulas eĉ ripetadon de la duonprefikso kiel prepozicio post la verbo, ekz.:

ĝisiri ĝis- ga goŭga go- goŭtu go
kunlabori kun- сътруднича с- сотрудничать с

eniri en- влизам в- войти в
depreni de- отнемам от- отнять от
Ni trarigardu nur iujn modelojn kun duonprefiksoj, kies traduko montras ilian slavan muldilon.

AL: alveni- пристигам/приехать
alligi- привързвам/привязать
alpremi- притускам/прижать
alteriĝi- приземявам се/приземиться
alporti- гонясам/принести
alkuri- готичвам/прибежать
En iuj vortoj estas idiomeco:
alpigi- gonлащам/гонлать
alskribi- прунувам/прунуать
alvoki- призовавам/призвать
aldoni- добавам/прибавить ktp.

ANTAŬ: antaŭparolo- предговор- предисловие
antaŭfesta- предпразничен- предпразничный
antaŭlasta- предпоследен- предпоследний ktp.

ĈIRKAŬ: ĉirkaŭrigardi- оглеждам- осмотреть

ĉirkaŭpreni- обхващам- обхватить
ĉirkaŭmordi- оглоздам- обгладывать ktp.

DE: detranĉi- отрязвам- отрезать
depuŝi- отблъсквам- отталкать
deŝiri- откъсвам- отрывать ktp.

EL: 1) baza signifo: eltiri- измъквам- вытщить

elporti- изнасям- вынести
elfali- изпадам- выпасть
elpeli- изгонвам- выгнать

2) metaforaj signifoj: elpensi- измислям- выдумать

ellabori- изработвам- выработать
elrigardi- изглеждам- выглядеть (arkaiĝinta idiomajo forpuŝita jam de la vorto aspekti);

elpaŝi- выстунуть (kreita laŭ la modelo de tiu rusa verbo, multaj esperantistoj strebas sen granda sukceso anstataŭi per vortoj kun proksima signifo);

eldoni- издавам- издать (ankaŭ radikiĝinta idiomajo, kiun ne sukcesis forpuŝi la neologismo editori);

elparoli- изговарям/выговаривать (ofte estas anstataŭata per la vorto prononci);

3) fino de ago: elaŭskulti- услышам- выслушать

ellerni- изучавам- изучать
elĉerpi- изчерпвам- исчерпать (tiu ĉi vorto estas uzata plejparte kun sia metafora signifo);
elhaki- изсичам/вырывать ka.

Multaj esperantistoj donas al tiu prepozicio signifon de finita ago, sed pro la granda produktiveco de tiu ĉi duonprefikso kun baza signifo "el interno de", ĝia uzado kun signifo de finita ago estas limigita nur en ne tre granda kvanto de vortoj, plejparte de tiuj, kiuj estas modelitaj laŭ slavaj vortoj kun la sama signifo.

EN: eniri- влизам- входить
enamiĝi- влюбвам се- влюбиться
enlasi- впускам- впустить
enmeti- влагам- вложим ktp.

ĜIS: ĝisnaĝi- гонлувам- гонлать
ĝisvivi- доживявам- дожить
ĝisatingi- достигам- достигать.

KUN: kunaŭtoro- съавтор- соавтор
kunlabori- сътруднича- сотрудничать
kunsenti- съчувствувам- сочувствовать
kunligi- свързвам- связать ka.

PO: posemajna- поседмичен
pomonata- помесечен
pojara- погодишенка.

PRI: pripensi- обмислям- обдумать
pridiskuti- обсъждам- обсудить
priskribi- описвам- описать
prilabori- обработвам- обработать
priridi- осмивам- осмеять ka.

SEN: senhejma- бездомен- бездомный
senfina- безкраен- бесконечный
senkapigi- обезглавявам- обезглавить
senmorta- безсмертен- бессмертный ka.

Malgraŭ ke la derivitaj vortoj en Esperanto, formitaj per prepozicio kiel duonprefikso, ekstere similas al la latinidaj vortoj, la analizo montras, ke la plimulto de ili estas modelita laŭ la analogiaj slavaj vortoj.

La slavaj multradikaj vortoj formitaj laŭ la reguloj tre facile estas modeleblaj en Esperantajn kaj servis kiel modeloj por la E-vortfarado. La jenaj ekzemploj de bulgaraj kaj rusaj multradikaj vortoj klarigas tion:

работоспособен- работоспособный- laborkapabla

зеленчукохранилище- овощехранилище- legomkonservejo

металорежеш- металлорежущий- metaltranĉa

главоломен- головоломный- kaprompa
водопровод- водопровод- akvokondukilo
жизнеспособност- жизнеспособность- vivkarableco

равноправие- равноправие- egalrajteco ktp.
Esperanto uzas kelkajn modelojn de slavaj esprimoj, formitaj pere de ripetado:

plenplene- препълнено- полным- полно
finfine- в края на краищата- в конце концов

vole-nevole- волю-неволю- волей-неволей
iom post iom- малко по малко- мало-пому

Resume oni povas aserti, ke la E-vortfarado sin bazas sur modeloj siveritaj de la slavaj lingvoj, malgraŭ ke estas analogoj ankaŭ en aliaj lingvoj.

(Daŭrigota)

Nikola UZUNOV

LA AMASTURISMO KOMENCIĜIS ANTAŬ 150 JAROJ

Precize je la kvina de julio 1991 estos antaŭ 150 jaroj, ke anglo Thomas COOK organizis la unuan ferian vojaĝon; vagonarvojaĝon de 15 km inter Leicester kaj Longborough kun nuraj starlokoj. Partoprenis 600 personoj.

Tio estis la komenco de la amasturismo, kiu nun jare nur en malgranda Nederlando pli ol sep milionojn da eksterlandaj somerferioj ampleksas.

Thomas Cook, kiu vivis de 1808 ĝis 1892, posedis malgrandan presejon, sed li estis ankaŭ sekretario de "Asocio de Abstinenculoj". Pro tiu funkcio li multe vojaĝis per la vagonaro por fari prelegojn. Dum unu de tiuj predikvojaĝoj lin kaptis la ideo organizi ekskursojn.

La unua vojaĝo en 1841:

La unua vojaĝo fariĝis granda sukceso. Malgraŭ la pluvo de fulgo kaj varmegaj fajreroj el la longa tubo de la lokomotivo.

Kvankam la vojaĝcelo estis parko de riĉa abstinenculo en Longborough, kie la vojaĝintoj estis regalitaj per prelegoj, teo kaj panetoj kun ŝinko, ĉe la fino de la tago estis ebruloj.

Malgraŭ tiu seniluziigo por Thomas, li efektivigis kontrakton kun la "Midland Counties Railway Company" (vagonarkompanio).

Festa regalo:

Depost 1845 Cook laboris por propra konto. Ĉiun someron li organizis ekskursojn al aliaj partoj de Britio. Tie la alveno de tiom multe da fremduloj samtempe, ĉiam ankoraŭ estis kaŭzo de granda ekscititeco. La vojaĝintoj estis bonvenigataj per muziko; flagoj estis pendigitaj kaj salutpafoj ekpafitaj.

Kiam en 1851 en Londono okazis la unua mondekspozicio, Thomas Cook mem presis specialan gazeton, verŝajne la unua gazeto en la mondo, tute dediĉita al la turismo. Cook persone disdonis ĝin ĉe la stratanguloj kaj fabrikpordegoj. "Kial la laboristoj ne irus al la mondekspozicio?", - li skribis en la gazeto.

Eksterlanden:

Ankaŭ la jaro 1863 estis grava en la kariero de Thomas Cook. Li anoncis la unuan eksterlandan vojaĝon al Svislando kaj la montosupro "Mont Blanc" (la Monto Blanka). Pli ol 500 da homoj reagis. La plej multaj el ili deziris vojaĝi ĝis Parizon, sed 120 vere iris en la montaron.

Unu jaron poste Cook trairis per glitveturilo kaj kaleŝo la Alpoj por esplorigardi Italion.

La unuan vojaĝon al Usono en 1866 gvidadis lia filo kaj post dek jaroj la nomo de la vojaĝentrepreno fariĝis "Cook and Son" (Cook kaj filo). Ili eĉ enkondukis en 1873 la unuan turisman ĉekon, ĝi havis la valoron de kvin kaj dek funtoj sterlingaj. Oni povis pagi per ĝi en 200 hoteloj, post sep jaroj jam en mil.

Poste Cook fariĝis ankoraŭ konata en pli grandaj partoj de la mondo pro la prizorgo de vojaĝintaj transportoj sur la rivero Nilo en Egiptio kaj de vojaĝoj por pilgrimantoj al Mekka kaj Medina.

En 1932, kvardek jarojn post la morto de Thomas Cook, ekestis komuneco de posedado kun la "Compagnie internationale des Wagonlits" per la nomo "Wagons-Lits/Cook".

El "La Migranto" - 2/1991

10 000 GMK. POR E-KULTURPREMIO

La Stutgarta FAME-fondaĵo kaj la urbo Aalen (suda Germanujo) faris kontrakton pri Esperanto-kulturpremio 10 000 gmk. La mondvaste plej alta Esperanto-kulturpremio celas igi "kulturan kreadon utila por la internacia interkompreniĝo". La Esperanto-kulturpremio unue estos aljuĝita en Aalen ĉi-jare.

Laŭ la statuto de la Esperanto-kulturpremio ĝi povas estdi aljuĝita al "personoj, asocioj aŭ organizoj, kies kreado, utilo aŭ disvastigado de kulturaj verkoj kadre de plurjara engaĝo laŭ la celoj de publika utilo de FAME-fondaĵo utilis al la subteno de internaciaj kompreniloj". Pri la laŭreatoj estonte decidis internacia ĵurio, kiun ni volos voki dum la Universala Kongreso de Esperanto en Bergen, kiel Alois Meiners, prezidento de FAME-fondaĵo, klarigas. "La internaciecon de nia fondaĵo substrekas, ke niaj unuaj premioj estas eksterlandanoj", diras Alois Meiners, kaŝante la feliĉulojn.

FAME-fondaĵo insiste subtenas la ideon pri neŭtrala dua lingvo por la internaciaj rilatoj. Laŭ statuto FAME-fondaĵo akcelas la interkompreniĝon inter la popoloj, la evoluhelpon, sciencan kaj esploradon, flegadon de la junularo kaj kulturon. Unu el ĝiaj unuarangaj intencoj estas, profesie realigi idealistajn celojn. La sendependeco de la fondaĵo ebligas akceli novajn ideojn kaj novajn projektojn kaj stimuli pli intensan kunlaboradon de la laborantoj por internacia interkompreniĝo.

BULGARA ESPERANTO-MUZEO KAJ BIBLIOTEKO - GRAVA SCIENCESPLORA CENTRO

Reprezentanto de la redakcio de "Bulgara Esperantisto" renkontiĝis kaj parolis kun la direktoro de Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko Georgi Mihalkov pri la agado kaj la perspektivoj de la muzeo kaj biblioteko.

"BE": Dum la lasta monato okazis gravaj ŝanĝoj en la strukturo de la Centra Oficejo de Bulgara Esperanto-Asocio. La 5-an de oktobro 1991 la Estraro akceptis kaj aprobis la novan Statuton de Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko kaj decidis, ke ĝi estu memstara. Ĉu tio donas novajn perspektivojn por la agado de Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko?

G. M.: Laŭ la nova strukturo en la Centra Oficejo de BEA, ne plu estos fakoj - kultura, scienca, instrua ktp. La estraranoj, kiuj respondecas pri la koncernaj fakoj, plenumos la laboron honorofice. Tamen BEA havas grandan, riĉan muzeon, bibliotekon kaj arkivon. Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko estas fondita de BEA, tamen ĝi estas nacia valorajo, kiu oficiale apartenas ne nur al la ĉeno de ĉiuj ekzistantaj muzeoj kaj bibliotekoj en nia lando, sed ĝi havas gravan internacian signifon, ĉar ne multaj estas la Esperanto-muzeoj kaj bibliotekoj en la mondo. Dum pluraj jaroj nia muzeo kaj biblioteko ludis signifan rolon en la sciencesplora, eldona kaj eduka agado de BEA. Nun en la novaj kondiĉoj Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko nature fariĝas sciencesplora centro, kiu devas koncentrigi la spiritan, kulturan kaj sciencan agadon de nia Asocio.

"BE": Kiuj estas nun la ĉefaj taskoj de Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko?

G. M.: Ĝi daŭrigos kolekti Esperantajn

librojn, revuojn, dokumentojn, fotojn, kasedojn, gramofondiskojn, raportojn, studojn, disertaciojn, esperantajjn, ktp., kiuj fake estos prilaboritaj.

"BE": Kiamaniere vi pliriĉigas Bulgaran Esperanto-Muzeon kaj Bibliotekon?

G. M.: Ni abonas plurajn Esperanto-revuojn, aliajn ni ricevas interŝanĝe de diversaj landoj. Regule ni aĉetas noveldonitajn Esperanto-librojn, interŝanĝas librojn kun aliaj Esperanto-Asocioj kaj ne laste ni ege atente zorgas pri la Esperantaj kulturheredaĵoj de bulgaraj esperantistoj.

"BE": Vi jam unu jaron laboras en Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko, kiajn kontaktojn vi starigis kun aliaj Esperanto-muzeoj, bibliotekoj kaj Esperantaj Sciencesploraj Centroj en la mondo?

G. M.: Mi daŭrigas la bonajn rilatojn de Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko kun Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kies direktoron Herbert Mayer mi persone konas, krome mi starigis kontaktojn kun Akademio Internacia de Sciencoj en San Marino, kun la Terminologia Esperanto-Centro de UEA, kun Tutmonda Esperantista Bibliotekista Asocio en Usono kaj kun kelkaj aliaj Esperanto-bibliotekoj.

"BE": Kiaj estas viaj enlandaj kontaktoj?

G. M.: Nia muzeo kaj biblioteko kunlaboras kun Bulgara Nacia Biblioteko "Sanktaj Kiril kaj Metodij" kaj kun la universitataj bibliotekoj en nia lando, kie estas instruata Esperanto en iuj universitatoj kaj altlernejoj.

"BE": Kiamaniere Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko helpas la esperantistojn en nia lando?

G. M.: Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko havas du ĉefajn celojn: unue ni strebas informi la esperantistojn en nia lando pri la riĉeco de la Esperanta literaturo, kaj en nia biblioteko ili ne nur trovu la libron, kiun ili serĉas, sed ili informiĝu pri la pluraj

diverstemaj verkoj, kiuj ekzistas en Esperanto. Due: Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko kompetente helpas la esperantistojn, kiuj fake okupiĝas pri Esperanto, tradukistoj, sciencistoj, instruistoj, kulturagantoj, verkistoj ktp.

Dum la lasta jaro pluraj esperantistoj serĉis la helpon de Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko, ekzemple la konata tradukisto Venelin Mitev surbaze de la materialoj en la biblioteko kompletigis sian libron "Tradukarto". Nun Krastju Karucin preparas bibliografion pri la Esperantaj verkoj de Atanas Atanasov - ADA. En Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko Raja Androvska pretigis sian diplomlaboron "Bibliografio pri la Esperantaj verkoj de Kunĉo Valev". Studentoj, kiuj studas

Esperanton en Sofia Universitato, regule uzas la materialojn en Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko por siaj lecionoj kaj por la ekzamenoj.

"BE": La planoj por la estonta agado de Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko?

G. M.: Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko estas kaj estos unu el la plej seriozaj scienc esploraj Esperanto-centroj en nia lando. Ĉi tie, dank' al la riĉaj materialoj oni povas fari gravajn esplorojn rilate la historion de la Esperanto-movado en nia lando, kulturon kaj sciencon. Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko fake kaj kompetente helpas ĉiujn, kiu serioze okupiĝas pri la problemoj de la Lingvo Internacia kaj konscias, ke Esperanto vere estas unu el la gravaj kulturaj fenomenoj en nia mondo.

MEMORE AL

TRAJANKA PETKOVA



Ne plu estas inter ni malnova veteranino de la Esperanto-movado en nia lando: antaŭ nelonge forpasis la energia kaj plenmerita esperantistino Trajanka Petkova, honora membro de BEA.

Trajanka naskiĝis en tre malriĉa familio de elmigrintoj el Makedonio en 1908. Jam en sia junaĝo ŝi ellernis Esperanton kaj aktive eklaboris en la laborista E-societo en Sofio en la fino de la 20-aj jaroj. Ŝi faris impreson al ĉiuj per sia energia poresperanta agado kaj ĝuis la estimon de siaj kunsocietanoj. Ŝi organizis kursojn, disvastigis esperantan literatu-

ron, faris ardan propagandon de Esperanto. Korespondis kun eksterlandaj esperantistoj kaj publikigis en la gazetaro interesajn leterojn de siaj korespondantoj. Ĉar estis malaltstatura, oni ame nomis ŝin "Trajĉe". Tiu Trajĉe, kvankam juna fraŭlino, posedis fortan karakteron kaj ne fortiriĝis antaŭ la malfacilaĵoj, kiuj estis ĉiutaga fenomeno en la agado de la laboristaj esperantistoj en tiama Bulgario.

Sed tiu agema kaj riskema naturo agadis ne nur favore al la propagando kaj utiligo de la internacia lingvo. Ŝi estis tre kuraĝa partoprenanto en la socia vivo de progresemaj organizaĵoj kaj movadoj. Ŝi sentime laboris eĉ sur la fronto de la armita Rezistado kontraŭ la germanaj invadistoj en nia lando dum la Dua Mondmilito. Feliĉe, ankaŭ ŝia edzo Angel Petkov Ivanov (aŭ kiel amike ni nomis lin "Anĝelo") estis same simila abnegacia aganto de la Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA). La rimarkinda progresema geedza paro estis estimata kunbatalanto de elstaraj gvidantoj de la Rezistado. En la kruela batalo por la liberigo de nia popolo Anĝelo estis mortigita en 1941. Malgraŭ tiu sortobato Trajanka daŭrigis sian danĝeran agadon. Kiam estiĝis preskaŭ nebla la laboro por progresigo de Esperanto pro la obstakloj fare de hitleranoj, ŝi

daŭre agadis en la sofia esperantista societo de BEA. La konata aktivulino estis perforte forpelita el la societa agado kune kun Asen Grigorov k.a. progresemaj esperantistoj. BEA apenaŭ vivetis sub la kondiĉoj de hitlerana premo.

Post la fino de la Dua Mondmilito Trajanka simple disfloris. Ŝi daŭrigis sian okupon en la esperantista medio, estis elektata en la gvidorganoj de BEA, organizis la Virinan Komisionon kiel helporganon de BEA por laboro inter la esperantistinoj. La konata artistino Belka Beleva bone konas tiun agadon, ĉar ankaŭ ŝi helpadis al Trajanka. Krome, ŝi partoprenis la funkciadon de vico da aliaj neesperantistaj sociaj organizaĵoj. Ĉie Trajĉe estis konata kaj estimata. Oni esprimis rekonon al ŝi ankaŭ per altaj ŝtataj ordenoj.

En la lastaj jaroj de sia vivo ŝi malsanadis, tamen ne perdis la klarecon de sia menso. Sekvis el sia ĉambro la evoluon de nia lando kaj popolo. Najbaroj kaj konatuloj ŝatis pridiskuti kun ŝi diversajn temojn el la bolanta vivo.

Tiel ŝi ĝisvivis sian 80-jariĝon, kiun oni publike festis en granda kulturdomo de ŝia loĝkvartalo.

Respekton al ŝia hela memoro de nelacigebla esperantistino!

Nikola ALEKSIEV



Deziraro korespondi

ALBANIO

MARCEL CORTIADE - Rruga Skanderbeu 4, ap. 8, Tirane - pri tradukado, etniŝmo, ateismo.

BULGARIO

MARIETA ŜOŜEVA (29-jara) - 1326 Sofio, kv. "Obelja"2, bl. 261, vñ. G, ap. 98 - kun ĉi pri ĉi.

EMILIA IVANOVA (25-jara) - 9700 Ŝumen, Odrin 9, bl. 2, vñ. A, ap. 16 - kun ĉi pri turismo, historio.

GREKIO

ĤRISTOS KSULIDIS (46-jara) - Venizelu 52, 546 31 Thessaloniki - kun virinoj el Bulgario kaj aliaj landoj pri ĉi, kolektas poŝtmarkojn.

POLLANDO

BEATA MARGAZINSKA (14-jara) - PL-48-258 Twardowa, Zwiastowice 2 - interŝanĝas bildkartojn.

MONIKA MATYJASIAK (21-jara) - PL-05-600 Grojec, skr. pocztowa 52 - kun ĉi pri muziko, vojaĝoj, teatro.

SOVETUNIO

IVAN BORŜĈEVSKIJ (16-jara) - SU-357800 Georgievsk, ul. Kalinina 121-2 - kun ĉi angle, Esperante, ruse pri fotado, linvoj.

Gelernantoj (15-18-jaraĝaj) membroj de klubo Verda Papageto dez. kor. kun la tuta mondo. Adreso: 232600 Vilnius, Ukmerges g.25, Moksleiviu Rumai, Esperanto klubas.

PREMIO

Karaj legantoj, kiel ni informis vin en n-ro 11/1990 de "BE", la leganto kiu sendos solvojn de ĉiuj enigmoj publikigitaj en nia revuo, gajnos senpagan abonon de "BE". Post lotumado la premion gajnis Cveta Popova el Pernik, kiu regule havas la ĝustajn solvojn de ĉiuj enigmoj.

Elkoraĵo gratulon!

La Redakcio


ESPERANTO EN BULGARA ĴURNALO

En la streĉa antaŭbalota periodo en nia lando ĵurnalo "**Svobodn Narod**" (17.IX.1991) disponigis dukolumnan spacon por artikolo sub titolo "Esperanto servas al la komercaj interrilatoj". Ĝin verkis Lidia Ambroĵeviĉ, redakcia ĵurnalistino. Malgraŭ ke la titolo emfazas

la praktikan uzon de la Internacia Lingvo, la aŭtorino tre lerte akcentas diversflankajn ecojn de Bulgara Esperanto-Movado - organizo, kursoj, internaciaj rilatoj. Ni salutas la ĵurnalistinon pro ŝia kontribuo kaj bondeziras al ŝi novajn priesperantajn erojn!


Ni petas niajn legantojn, se ili trovas iun ajn mencion pri Esperanto en la periodaĵoj, ke ili sendu al la redakcio la koncernan numeron aŭ eltranĉaĵon (ne forgesante mencii titolon kaj daton). Antaŭdankon!

Krastju KARUCIN



Distroj

PIRAMIDO



Al ĉiu linio aldonu unu literon kaj miksu la aliajn, se estas necese:

1. Verba finaĵo.
2. Persona pronomo.
3. Femalo.
4. Kolora likvaĵo por skribi, presi aŭ desegni.
5. Bildo de sanktulo.
6. Japana nacia vesto.
7. Granda ŝarĝaŭtomobilo.

Cvetan MANOJLOV

Noto de la Redakcio: Limdato por alsendo de la solvoj ĝis la 30-a de januaro 1992. La rezultoj estos publikigitaj en n-ro 3/1992 de "BE".

Solvo de MAGIA ENIGMO

el n-ro 8-9/1991 de "BE"

Horizontale kaj vertikale: 1. Dosiero. 2. Stalo. 3. "Mia vivo". 4. Elito. 5. Provoko.

10 KONSILOJ AL TIUJ, KIUJ NE DORMAS BONE

- Antaŭ via enlitiĝo, fortrinku glason da varma lakto kaj prenu kulereton da mielo.
- Ĉiutage vi manĝu en samaj horoj. Tiel vi stabiligos viajn biologiajn ritmojn.
- Vi klopodu solvi dumtage la ĝenantajn vin problemojn, tiel ili ne okupos vian atenton dum la nokto.
- Fine de la tago faru longan promenadon aŭ gimnastikon.
- Kontrolu ĉu via lito kaj kuseno ne estas tre molaj aŭ malmolaj.
- Vi povas ĵoni malstreĉiĝi per agrabla muziko aŭ legajo - ekzemple nia revuo.
- Ripetadu: "Mi ekdormos, la nokta ripozo estas tre grava". Iom revu.
- Se vi ne povas baldaŭ ekdormi, ne restu en la lito, sed ellitiĝu, iomete legu, faru ian laboron, formanĝu pomon kaj post tio denove enlitiĝu.
- Se vi tamen travivis sendorman nokton, vi ne pensu, ke certe vi havos malbonan tagon.
- Se via maldormo daŭras pli ol kelkajn noktojn kaj neniel vi povas ĝin klarigi al vi, turnu vin al kuracisto. Dormigajojn oni ne devas preni sen konsulti kuraciston.

Esperantigis: Stefka ĈENKOVA

HUNDO KAJ KARAKTERIZO

En oficejo estis tri hundoj.

La unua bojas, sed ne mordas.

La dua mordas, sed ne bojas.

La tria nek bojas, nek mordas.

Iun tagon en la oficejon venis komisiono pri maldungoj. Ĝi venis ankaŭ por la hundoj.

"Laŭ la plano unu devas esti maldungita!"

- diris la komisiono.

La komisiono petis la personan dosieron de unua hundo.

"Ne mordas, sed bojas" - estis skribite tie.

"Ĝi restu!" - decidis la komisiono.

Oni donis ankaŭ la personan dosieron de dua hundo.

"Ne bojas, sed mordas" - estis skribite tie.

"Ĝi restu!" - decidis la komisiono.

Oni donis la personan dosieron ankaŭ de tria hundo.

"Nek bojas, nek mordas" - estis skribite tie.

"Ĝi estu maldungita!" - decidis la komisiono.

Oni malligis la maldungitan hundon de la ĉeno kaj liberigis ĝin.

Tiam ĝi ĵetis sin kontraŭ la komisiono bojante kaj mordante.

"Kian malĝustan karakterizon oni faris al tiu hundo!" - ekprotestis la komisiono.

"Tia ni konis ĝin, tia ni priskribis ĝin. Estis ligita!" - diris la estro de la maldungita hundo.



ONE OF THE GREAT
IDEAS OF OUR TIME

ESPERANTO

ELISAVETA
Bagriana
bordo
bordo

BULGARA ESPERANTO-A

AMATORA ART

KANTOJ, TEATRAJETOJ
POEMOJ, ANEKDOTOJ
HELPILO POR ARTGRUPOJ

Панорама
ЕСПЕРАНТО

STO RAIDENSKI

RAIDUVALIN' PAIDUVALIN'
BONVOLLU, MOLJA
E VIA DISPONO ZAPOVNUJATE
ESPERANTO, ESPERANTO
PAROL, PAROL
MORALU, MORALU

